

# Turka Stelo



## SALUTON,

Jen la fina numero de nia sesa jaro, numero 72!

Ni deziras al ĉiuj de vi

**FELIĈAN KRISTNASKON  
kaj  
PROSPERAN NOVAN JARON!**

En ĉi tiu numero ni prezentas al vi riĉan kolekton de diversaj artikoloj. Ĉiu leganto de Turka Stelo povas trovi ion interesan por si mem. Sed eble la plej interesa estas tiu de Petar Todorov el Bugario, kiu aplaŭdas la kvaliton kaj riĉecon de nia revuo. Ni dankas al kara Todorov pro siaj afablaj vortoj kaj ankaŭ pro siaj kontribuajoj li faris al Turka Stelo ĝis nun kaj deziras al li Feliĉan Nakisĝtagon kaj Sanon.

Pri la viruso ni aŭdas, ke en almenaŭ en Eŭropo la kazoj kulminas kaj ĉi tiu lasta ondo estas eble la plej granda ekde la omenco de la pandemio. En diversaj landoj pli firmaj antaŭzorgoj estas prenataj kaj ĉefe por la kontraŭvakcinistoj. Oni decidis pri la tria vakcino kaj

en kelkaj landoj la tria vakcinado jam ekkomencis.

Do surmetu vian maskon dum ekstere, evitu la popolamasaj ejoj (restoracioj, kafejoj ktp), en Kristnasko kaj novjaro evitu grandajn renkontiĝojn ktp.

Ni pensas, ke pli bone estus ke vi pasigu vian tempon hejme kaj vi legu nian revuon, ĉu en la venonta Sumoo kun aliaj partoprenantoj ĉu sole.

**Bonan legadon al ĉiuj !**

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Zamenhof Tago	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	5
FILEMONO kaj BAŬCISA (ΦΙΛΗΜΩΝ και ΒΑΥΚΙΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	8
Feliĉan jubilean naskiĝtagon al Petar Todorov	9
El la literaturaj paĝoj de MAS	10
Lupo en hundejo	12
André Malraux	12
Misteroj - Elpensita aŭ vera? (2)	13
La Polino - parto 2	14
Kaprico	16
La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj (8)	16
Ŝercoj	18
Krucvortenigmo	18
La sagaculo	19
Mirinda lego-sperto kun Proust	20
Miaj versoj	21
Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj (parto 3)	21
Sopir' en nokto	24
BET-56	24
La fera birdo	25
La maro impresio	25
Esperanto	25
KAFAR (Καφάρ) *	26
El tagĵurnalo de kato	27
Migrantaj akvaj birdoj en areo de Miŝkolc	27
Animo disiĝinta de la korpo	28
EKRA 2021 - Humuraĵoj- D-ro Parmakova	29
Kuracistaj historioj	30
Mirakla fabelo	31
Por la 134-a jariĝo de Esperanto uzado	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo. Pasintvintre ekde la 22-a de novembro 2020 ni komencis serion de retaj kursetoj, ĉiu 30 minutojn longa, ĉiusemajnaj, pere de google.meet, pri diversaj gramatikaj punktoj de Esperanto. Temoj kaj iliaj planitaj datoj estas la jenaj: 22/11 Akuzativo, 29/11 Transitiveco, 06/12 Parteciploj, 13/12 Korelativoj, 20/12 Prepozicioj, 27/12 Sufiksoj, 03/01 Refleksiva pronomo: Si  
<https://edukado.net/kursejo?kid=27268>

Ĉe Burdur Mehmet Âkif Ersoy Universitato okazas Esperanto-lingvokurso nome "Esperanto Dili" kiel oficiala registrita universitata kurso elektebla de studentoj el diversaj fakultatoj. La kurson gvidas la unviersitata matematika instruisto Utku Gürdal. Al la kurso aliĝis 15 studentoj.  
<https://edukado.net/kursejo?kid=27360>

## Zamenhof Tago 15/12/2021



## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



Karaj,

Vekiĝu kaj partoprenu en la Sumoo denove!

En la korona erao Esperanto-Sumoo estas la plej bona rimedo por lernado kaj movado de Esperanto. Tuj sendu vian alig^on al mi.

Baldaŭ la novembra Sumoo (la 72-a Sumoo) komenciĝos la 14-an de novembro (du semajnoj). Mi atendas vian aliĝon.

Sendu jenajn datumojn:

1. Viaj sumoo-nomo kaj vera nomo kun sekso
2. Libro, kiun vi legos (1) Titolo (2) aŭtoro (3) eldonejo
3. Kiom da paĝoj vi legos por unu tago

Bonvolu varbu viajn konatojn al la sumoo. Precipe oceanianojn kaj afrikanojn.

### HORI Jasuo

371-0825 Japanio, Gunma,  
Maebas^i, Ootone 2-13-3  
Retadreso: hori-  
zonto@r.water.sannet.ne.jp

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 994 (2021-11-01)  
**“Alivorte”, de Marco Lucchesi: nova libro senpage elŝutebla ĉe UEA**

“Alivorte” estas la nova libro de Marco Lucchesi, publikigita elektronike kaj disponigita senpage al la tuta komunumo ĉe UEA.org: [uea.org/teko/libroj](http://uea.org/teko/libroj). [...]

N-ro 995 (2021-11-12)

### **Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago por Toleremo 2021**

Universala Esperanto-Asocio, okaze de la Internacia Tago por Toleremo, la 16-an de novembro 2021, memorigas pri la celo de Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO antaŭenigi interkompreniĝon inter kulturoj kaj popoloj. [...]

N-ro 996 (2021-11-14)

### **Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago de Infanoj, 20 novembro 2021: Konstrui la estontecon NUN**

La Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj (UNICEF) estis kreita jam en 1946, do frue en la historio de UN. Ĉi-jare ĝi fariĝas 75-jara. [...]

N-ro 997 (2021-11-23)

### **Koncerto Nokta ŝoforo: jarfina donaco al membroj de UEA**

Kiel simbolon de agnosko pri la kontribuado de miloj da homoj al la Asocio dum 2021, UEA proponas kiel specialan jarfinan donacon la koncerton Yves Desrosiers: Nokta ŝoforo Vive ĉe Vimeo. La koncerto estas ekskluziva por membroj de la komunumo de UEA: ĉiuj, kiu [...]

## TEJO



27/10/2021

**Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en**

### **Roterdamo (2022)**

Kadre de la Eŭropaj Solidaraj Korpusoj (antaŭe Eŭropa Volontula Servo) TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de... [...]

26/10/2021

### **Partoprenu studsesion en Budapeŝto pri seksismo**

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KoE) kaj la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto (EYCB) organizas la studsesion X Lingvo: la efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado. La studsesio donos la eblon al... [...]

## Leteroj de niaj legantoj



Hola! Senlaca kompilanto kaj dissendanta de nia jam komuna revuo Turka Stelo. Miaopinie multaj estas la legantoj ŝatantaj ŝin pro riĉenhavo, aparte pro beletraĵoj. Min ne laste atentigis ankaŭ la "cerba gimnastikaĵo" de japana kunlaboranto, sed plej multe la ekapero de la novelo de mia amiko Bajram. Dankon!

Amike

**Bardhyl Selimi** el Albanio,



Estimata,  
Elkore mi dankas al vi por la aperigo de mia poemo.  
Gratulon al la belega kaj riĉenhava Turka stelo!

Amike,

**Nazaré Laroca** el Brazilo



Karaj,  
koran dankon pro la publikigo de mia daŭrigaĵo kaj versaĵeto. Sukcesojn al vi.

**Antanas Vaitkevičius** el Litovio.



Saluton,  
Mi rapide rigardis mian leterkeston ĉi matene antaŭ ol kuri al la radiostacio por elsendi nian semajnan programon. Mi senpacience atendas mian rehejmiĝon por ĝin atente legi.

Dankon pro tiu plezuro

**Franciska Toubale** el Aŭstralio



**Ĉiama Trezoro**

La numero 50 (februaro 2020) estas la unua eldono de Turka Stelo, kiun mi legis. Ekde tiam mi ĝuas ĉiun novan eldonon. Sed, ĉi-matene de la 14a de novembro, mi scivolis pri la antaŭaj numeroj de la revueto. Do mi elŝutis kaj eklegis ilin. Ho, kia sperto! Mirindan trezuron malkovris mi.

Tra la unuaj 50 numeroj estas tiom da elstaraj artikoloj ĉiaspecaj: rakontoj, komunaj spertoj, eseoj, poemoj, nekrologoj, intervjuoj, libro/filmo-kritikoj, biografioj, receptoj, leteroj de geamikoj, kaj novaĵoj el la tuta mondo.

Kelkajn malnovajn artikolojn ŝategas mi: la kortuŝan rakonton pri la unusola elefanto transvivinta batalon ("La Lasta Milita Elefanto" de Shen Shixi [TS #4]), la intervjuon de Sen Genŝicu pri paca mondo post milito ("Unu taso da teo superas armilojn" de Horio Jasuo [TS #12]), kaj, kompreneble, la fascinan esploron pri filozofio ("Mallonga Historio de Filozofio" de nia

ĉefredaktoro Vasil Kadifeli, en multaj numeroj).

Cetere, kaj plej grave, mi legis ĉiujn ŝercojn.

Turka Stelo nun estas multe pli ol nur revueto. Ĝi kreskis al la nivelo de kroniko, kiu kaptas la profundan komunuman senton, kiu animas la Esperanto-spiriton.

Dankon! Via kontribuo al la Esperanto-kulturo estos eterna.


**marioo** el Kanado



Saluton, Dankon pro la lasta, novembro numero 071 de Turka Stelo. Ĝi kiel ĉiam estas bonkvalita kaj interesa. Des pli, ke la kvanto de kontribuantoj pli nombriĝas kaj la temoj de artikoloj iĝas pli diversaj, tiu fakto estas salutinda. Tio atestas, ke Turka Stelo estas pli interesa kaj pli alloga. Sukceson. Mi proponas al la legantoj de TS mian novan humurajhon "La sagaculo", bonvolu legi ĝin kaj ĝui.

Amike via,

**Laimundas Abromas** el Litovio



Kara amiko, koran saluton!

Dankon, ke vi publikigis mian poemeton KIE FELICHO sur via revuo TS kaj sendis la TS'on al mi!

Mi tre ĝojas ricevi tion kaj legi ĉiujn verkojn kun granda plezuro kaj lernis multe el tio.

Tutamike

**Gajo** el Ĉinio



Karaj,

Mi kore dankas vin pro la Turka-Stelo-071 tiu, kiu estas tre utila kaj bone farita.

Mi gratulas vin por, ke en mallonga tempo ĝi fariĝis mondafama...

Amike,

**d-ro Mukunda Pathik** el Barato



Elkorajn salutojn kaj bondezirojn al vi!

Kiel ĉiam mi kun granda plezuro tralegis la lastan numeron de via revuo. Mi ne dirus ke ĝi estas amatora. Vi ĉiam pretigas ĝin tre profesie, en alta nivelo. Dum la foliumado mi ĉiam sentas min en vera E-ujo. Diversĝenraj eldonaĵoj ĉiam estas tre interesaj, allogaj kaj plezurdonaj. Mi elkore deziras al via teamo fortan sanon, inspiron kaj pliajn sukcesojn!

Amike kaj altestime

**Gafur Mirzo** el Uzbekio

Ĝi estas mirinda vivo (It's a wonderful life)

**U**nu el la enmigrintoj, kiuj kreis la Usonan Mozaikon, Frank Capra, la filo de malriĉa enmigrinta familio de Sicilio, montris sian engaĝiĝon al la usona idealo en ĉiuj siaj filmoj (kaj en la propagandaj filmoj, kiujn li filmis dum la Dua Mondmilito). Fontoj rakontas, ke en siaj filmoj, li priskribas sian kredon je la "Usona Sonĝo", sian



simpanion por la solidareco de la malsupraj kaj mezaj klasoj, kiuj vivas en urbetoj prefere ol grandaj urboj, kaj la lukton de idealismaj individuoj kontraŭ la kruelaj riĉuloj. Frank Capra estis kontraŭkomunisto. Sed li estis ankaŭ kontraŭ senkompataj kapitalismaj tipoj. La periodo, kiam lia kinejo prosperis, estis naiva mondo, en kiu Usono kaj la mondo ne estis tiom "maniuloj de perforto aŭ de drogoj", kaj la financa mondo kaj serva sektoro estis pli malgrandaj ol hodiaŭ (eĉ en Usono). Kritikista pensanto povas trovi la feliĉajn finaĵojn en sia kinejo tre emociaj kaj nerealismaj. Sed malgraŭ ĉiuj siaj rezonadoj, oni povas serĉi kaj trovi enamiĝon, amikecon kaj solidarecon en la filmoj de Frank Capra en ĉi tiu kruela mondo. Capra



pluvivos."

En ĉi tiu artikolo, mi faros demandojn pri la filmo "It's a wonderful life" (Ĝi estas mirinda vivo) de Capra, en kiu la giganta aktoro James Stewart rolas la ĉeffiguron. Farita en la jaro 1946, tiu filmo estis multfoje

adaptita kiel radioteatraĵo, televiddramo aŭ televidspektaklo kaj teatraĵo. Laŭ kelkaj fontoj, ĝi estis montrita dum ĉiuj Kristnaskoj en Usono. Kiel vi povas vidi, ĝi preskaŭ fariĝis simbolo de adoro. Kvankam eble plej multaj spektantoj konas la brutalan realecon de la vivo; ili volas refreŝigi en la plej profundo de siaj memoroj la bildon de feliĉa kaj kompatema mondo. Ni transiru al la demandoj!



- Se George Bailey povus vojaĝi tiel, kiel li volus, ĉu li fariĝus alia persono aŭ ĉu li estus entreprenisto, kiu revenis kun nur geografiaj spertoj?

- Ĉar la vivoj de homoj estas ligitaj per nevideblaj ligoj, homoj de malsupraj klasoj, kiuj ne havas eĉ moderan riĉaĵon same al George Bailey, provus memmortigon kaj anĝelo el la ĉielo, kiel Clarence en la filmo, estus sendita por montri al ili kiom altvalora estas ilia vivo, ĉu tiuj malriĉuloj regajnus esperon?

- Eĉ se ni faras tre inteligentajn analizojn pri tiaj filmoj, ĉu, en la profundo de niaj koroj, ni ne volas vidi tian mondon, kie la malbono estas venkita?



- Ĉu la pasinta tempo estis tute bona, ĉar ĉi tiu filmo portretas senkompatan homon same al s-ro Potter, kaj priskribas homon, kies la ekzisto de animo estas diskutebla, kio estas menciita en iu de la replikoj de la patro de Bailey?

- Ni nostalgias tiujn malnovajn jarojn en kiuj ankaŭ estis ekonomia deprimado kaj militoj, do, ĉu la fonto de la hodiaŭaj perforto kaj krueleco ne estas malnova? Ĉu ĝi ne estas eĉ pli malnova ol Habelo kaj Kaino en la Torao?

- Kial do, ni ĉiam plendas pri nia tempo? Ĉu malbono ĉiam ne ekzistis? Ĉu ni certas, ke ĝia kvanto pliiĝas nuntempe?

- Se anstataŭ la Bailey-karaktero, lia edzino Mary aŭ la policisto Bert aŭ sinjoro Potter estus memmortigintaj, kion montrus al ili la anĝelo sendita de

**Ĉ**u Dio ekzistas? Jen demando tre simpla kaj samtempe tre komplika, kiu tamen estas plej multe kaj plej diverse respondita.

Jes, tute sendube dio estas! Ĉiuj homoj akceptas tion, malgraŭ, ke ili ne pensas ĉiam pri unu komuna dio. Ĉu, do, multaj dioj? lasence jes, multaj laŭ tio, ke kelkaj hom-grupoj havas ian ideon pri la dieco, dum alia havas ideon diversan.



havas sian propran Dion, ĉiu homo, laŭ sia koncepto, pens-kapablo, idiosinkrazio, sentemo kaj multo alia, formas sian propran abstraktan ideon pri tiu ĉi, tute propra afero!

Cetere, Platono (Πλάτων) diras, ke "la korpo estas la sanktejo de la animo", kaj el tio oni povus supozi, ke, laŭ la granda filozofa, ĉiu el ni havas sian propran dion, kiun li adoras kaj kultas per sia korpo, per sia menso kaj sensoj!

Tamen, ni lasu tiajn malfacilajn temojn, ni iru al la tempoj de la mitoj, kiam tiaj luksaĵoj ne estis, ĉar tiam la dioj estis ne nur kreintoj kaj protektantoj de la vivuloj, sed ankaŭ severaj regantoj kaj kontrolantoj de la homaj aferoj!

Tiele, do, iam la reĝo de la mondo, Zeŭso (Ζεὺς), deziris havi propran ideon pri la homa vivo kaj la ĝenerala homa konduto, do, li decidis inspekti, ni diru, sian surteran reĝejon. Li petis la helpon de sia filo Hermeso (Ερμής), la dio vojaĝanto, kiu pli bone ol ĉiu alia dio sciis la homojn kaj ties aferojn.

Laŭ la konsilo de Hermeso, la du dioj aliformiĝis en ordinarajn homojn kaj komencis sian longan vojaĝon. Longe ili vizitadis multajn lokojn, urbojn, urbetojn, vilaĝojn, ili sin montris fremduloj, vagantoj, pilgrimantoj, almozuloj, komercantoj, aventuristoj, ili aliris kiel eble plej proksime al la homoj kaj ĉiam ili ion oferis aŭ ion petis de ili.

Kelk-foje ili ŝajnis sin fremdaj komercantoj aŭ alt-ranguloj, spionoj, riĉaj friponoj, kiuj volonte oferus oron aŭ oficon al personoj pretaj servi ilin, ŝtelante ion aŭ perfidante, mallojale denunciante, akuzante

senkrimajn homojn, farante ĉion ajn similan.

Aliffoje ili ŝajnis sin malriĉaj malsatuloj, mort-malsanaj aŭ kadukaj homoj, kiuj petegis pri helpo aŭ panpeco.

La tempo pasis kaj la du dioj ĉiutage pli kaj pli dolorige konstatis, ke en la homa mondo regas indiferenteco kaj malamikeco. Ne nur la fortaj kaj riĉaj homoj, sed ankaŭ la malriĉaj, la ordinaraj humiluloj, tute simile kaj ĉiam volonte faras ĉian ajn delikton, ĉian malbonfaron, por havi ian ajn profiton aŭ gajnon. Ĉiuj deziris ion preni, neniu intencis ion doni kaj tio estis tute komuna karakterizaĵo de la homoj, en la urboj aŭ en la vilaĝoj.

Zeŭso, desapontiĝinte, komencis pensi pri nova kataklismo, komencis pensi pri siaj katastrofaj fulmoj, sed Hermeso klopodadis lin konvinki, ke la esperoj ne estas tute perditaj, ke ie estas kaŝita la pruvo, ke en la homa mondo ĉiam kreskas la bono.

Tiele, la du dioj daŭrigis sian vojaĝon tra la mondo de la mortemuloj.

Tamen, ni lasu ilin al ilia vagado, kaj kvazaŭ iliaj antaŭirantoj, ni iru rekte al Frigio (Φρυγία), la lando estanta en la nordokcidenta Malgrandazio.

Tie, en malproksima loko, en dista al granda urbo kampara, apudbarbara loko, estis, tute izolita, kaduka kabano, farita el branĉoj kaj koto. Tio estis la hejmo de Filemono kaj Baŭcisa, maljunaj kaj tre malriĉaj geedzoj.

Filemono kaj Baŭcisa estis geedzoj antaŭ jam tre multaj, ili ne plu memoris antaŭ kiomaj, jaroj. Ili estis ĉiam malriĉaj. Dum sia tuta vivo ili posedis nenion, krom reciproka, varma kaj senlima amo!

Tiuj du homoj dum dekoj da jaroj vivis izolite, malproksime de vilaĝoj kaj urboj, forpelite de la severeco kaj malboneco de la homoj. Ili sin nutris per tio kion oferis al ili la naturo kaj per la malmulto, kion ili povis kultivi prilaborante sian malgrandan ĝardenon.

De tempo al tempo, Filemono entreprenis penigan iradon al la plej proksima granda urbo, kie li povis trovi kelkajn ĉifonojn por ilia vestado aŭ kie, kelk-foje sukcesis interŝaĝi kelkajn siajn legomojn kontraŭ iaj necesaj uzaĵoj aŭ ne kultiveblaj nutraĵoj.

Tamen, lastatempe Filemono estis tre maljuna, li ne plu havis la forton porti pesaĵojn aŭ trapasi grandajn distancojn. Tamen, ankaŭ tio ne malkuraĝigis la maljunajn geedzojn, kiuj, malgraŭ sia malriĉeco, estis ĉiam gajaj kaj, tute strange, ĉiam feliĉaj.

Tiujn du homojn plejparte nutris kaj tenis vivaj kaj



viglaj, ilia neelĉerpebla, tre forta reciproka amo!

Ili ne havis, tamen ili ne bezonis liton, tablon, seĝon, ili sidis sur ŝtipoj, ili kuŝiĝis sur foliamasoj, ili manĝis sur ŝton-plato, ili, do, estis kontentaj, ĉar ili havis ĉion kion ili bezonis.

Ili ne povis fari ritajn donacojn al la dioj, ili povis nenion oferi al ili, krom sia sindediĉo kaj neskuebla kredo. Ili, tamen, preĝis, ĉiam kune, kaj petegis la diojn protekti la homojn, pardoni al ili pekojn kaj erarojn, doni al ili pacon, harmonion kaj unuecon.

Por si mem ili petis nur tion, ke ili havu samtempan morton. Tio, nur tio estis ilia konstanta preĝpeto, la samtempa ilia fino!

Tamen, ni lasu nun la simpatiajn geedzojn, ni iru denove al la du vojaĝantaj dioj, kiuj estis jam atingintaj Frigion, eĉ la proksiman al la malriĉa kabano de Filemono kaj Baŭcisa granda urbo. Tie ili sin prezentis en formo de malriĉaj vojaĝantoj kaj al ĉiuj kiujn ili renkontis, ili diris, ke surstrate ili estis atakitaj de rabistoj, kiuj forprenis de ili ĉion kion ili posedis.

Ili frapis multajn pordojn, ili petis heplon, manĝaĵon, gastadon, sed neniu oferis ion al ili, ĉiuj ignoris aŭ forpelis ilin.

Post tre longa vagado tra la stratoj de la granda urbo, konsumite de laciĝo kaj malsato, la homformaj dioj kusiĝis surtere, ĉe la pordego de la urbo, tamen gardistoj ekvidis kaj perforte forpuŝis, forpelis ilin el la urbo.

Post tio, ankaŭ Hermeso estis perdinta siajn esperojn, ĉio montris, ke la kriza decido de la dipatro estos neŝanĝebla.

Tamen, la du dioj, forlasinte la urbon, sencele daŭrigis sian vagadon sur la kamparo, malproksimen de la homoj.

Kaj liaj paŝoj, tute hazarde, kondukis ilin al la dista loko, kie estis la domaĉo de la maljuna paro.

Filemono de malproksime distingis la du fremdulojn kaj tuj kuris, kiom li povis kuri, renkonte al ili. Per varmaj salutvortoj li bonakceptis ilin, kore dankante pro la honoro kiun ili faris al li, vizitante lian hejmon.

La du dioj konfuziĝis, la unu rigardis la alian kaj, jes, ambaŭ konstatis, ke ilia aspekto estis tiu de malfeliĉaj, ĉifonvestitaj almozuloj. Ili, do, komprenis nenion!

Dume, ankaŭ Baŭcisa entuziasme alkuris al la fremduloj, same afable bonakceptis kaj kondukis ilin en la humilan kabanon.

Ŝi oferis al la lacegaj vizitantoj siajn du ŝtipojn, ŝi petis ke ili sidu kaj ŝi forkuris ekster la domaĉo. Post nelonge ŝi revenis portante pezan felsakon plenan je akvo. Malfacile spirante ŝi iom staris, poste ŝi genuiĝis antaŭ la fremduloj kaj provis lavi ties piedojn.



La du dioj, en plena konfuzo, tuj reagis, ili ne lasis la maljunulinon fari tion, ili klarigis ke ili estas ne grand-sinjoroj, sed humilaj almozuloj, al kiuj ne decas tia akceptado.

La maljunuloj protestis, ili diris, ke ĉar Zeŭso, la patro de la tuta mondo, benas la gastamon, ĉiuj homoj devas honori siajn gastojn, sendepende de ties rango.

La dioj surprizite aŭdis la malriĉajn geedzojn fervore paroli pri amo, toleremo, espero kaj pardono, ili deziris ekscii ĉion pri ilia vivo.

Sur la ŝton-plato, servanta kiel tablo, estis jam la malriĉa manĝaĵo de la geedzoj. Kaj tio estis nur kelkaj olivoj, tre malgranda peco da fromaĝo kaj unu tre seka pan-tranĉo. En malgranda, duonrompita pokalo estis iom da vino, el kiu Filemono, kiel eble plej ceremonie, verŝis surteren la duonon, farante sian oferon al la dioj.

Tuj poste, la geedzoj oferis al la fremdaj vizitantoj sian manĝaĵon, dirinte, ke ili estas jam manĝintaj antaŭ nelonge, do, ili estas jam tute sataj.

Malgraŭ tio, la du dioj persistis, ke la dom-mastroj sidu ĉe la tablo kaj manĝu kun ili. La gemaljunuloj obeis, ili sidis surteren, apud la gastoj, ĉiu el ili prenis po unu olivo kaj ŝajnis ke ili manĝas.

La du dioj komencis manĝi kun evidenta apetito kaj dume faris demandojn al la dom-mastroj. Ili demandis, kion la geedzoj bezonas kaj tiuj respondis, ke ili bezonas nenion, ĉar ili havas ĉion, ĉar la unu havas la alian, ĉar dum dekoj da jaroj la unu ĝuas la amon de la alia.

Nur kiam la dioj demandis, kiu estas ilia plej granda deziro, la gemaljunuloj unuvoĉe respondis, ke ili havu samtempan morton!

Kiom longe la maljunaj geedzoj iom embarase respondadis al la sinsekvaj demandoj de la fremduloj, tiuj lastaj manĝis kaj manĝis; ili manĝis olivojn, sed ĉiam estis olivoj sur la tablo, ili manĝis kun evidenta avideco la fromaĝon, la panon, sed sur la tablo restis plia fromaĝo kaj plia pano; kaj en la pokalo estis kroma vino, malgraŭ ke la du gastoj trinkis ĝin sinsekve per grandaj glutoj!

Filemono kaj Baŭcisa samtempe rimarkis kaj



konsciis ke io tre stranga, io mirakla okazis, ili fulme ekkomprenis, ke la vizitantoj estas ne ordinaraj homoj, kaj plenaj je normala timo kaj respekto ili falis surteren, ador-kliniĝis antaŭ la dioj.

Tiuj lastaj, nur tiam prezentiĝis antaŭ la gemaljunuloj en sia tuta brilo kaj majesteco, ili brakumis la geedzojn kaj patrece trankviligis kaj kuraĝigis ilin.

Zeŭso diris al la surprizbatitaj geedzoj, ke per ilia konduto ili savis la tutan homan genron, ĉar ili montris, ke bono estas ankoraŭ, ke espero ekzistas, ke la brileto povos eble iĝi brilego, la fajrero, fajrego. La granda dio konfidis al ili gravan komision, ke ili montru al la homoj la ĝustan vojon al la virto, kiel gepastroj de lia sanktejo.

Kaj kiam Zeŭso diris tion, la humila kabano malaperis kaj sur ties loko prezentiĝis majesta, granda sanktejo!

La piaj geedzoj iĝis kaj ekde tiam servis kiel pastroj de la brila sanktejo, al kiu amase alkuradis la homoj por honori la miraklofaran mond-mastron.

Filemono kaj Baŭcisa vivis ankoraŭ longe kaj ili mortis kune, samtempe. Tio okazis unu someran vesperon, kiam la maljunaj geedzoj eliris el la sanktejo, kaj laŭ sia malnova kutimo, kuŝis apud la roĵo, por

ripozi post laciga tago. Tie, subite, ili mortis, ili ambaŭ, la saman momenton, mortis, ili kune forpasis, tenante la unu la manon de la alia!

Kiam tio okazis, mirakle, sur la loko de Filemono ekaperis granda, fortika kverko, kaj sur la loko de Baŭcisa ekkreskis alta, belega tilio!

La du arboj staras tie, ekster la sanktejo de Zeŭso, iliaj radikoj profunden, forte disvolviĝas en la teron, ili kovras la tutan lokon, kie iam estis humila ĝardeno kaj malriĉa kabano, malplena je aĵoj sed plenplena de la plej granda trezoro, de amo!

Oni diradis, ke la du arboj ĉiam staras kaj eterne staros tie, ke kiam la venteto blovas, iliaj branĉetoj moviĝas, la unuj tuŝas, sencese karesas la aliajn, kaj tiu ludado estas mirinda kaj eterna.

La lokaj homoj diradis, ke sub tiuj arboj sidis por revii, por flustri, por interŝanĝi amvortojn kaj ampromesojn geamantoj, kiuj el la folisusurado ricevis benon, favoran al ilia amkunligiĝo.

Jes, la geedza amo de Filemono kaj Baŭcisa restas en la daŭro de la jarmiloj viva, eterna simbolo por ĉiuj homoj kaj inspiro por la artistoj.

Kaj en la komenco de tiu ĉi rakontado mi parolis pri Dio, ĉar tiu opinio, pri propra dio kaŝita en la animo de ĉiu homo, ŝajnas ne tute malestiminda, eĉ pro tio, ke laŭ tiu ĉi nia historio, ankaŭ la dioj povas esti instruataj de la homoj.

La mita paro restas vivanta en la animo de la geamantoj kaj, krome, Baŭcisa inspektas ĉion pri la geedza amo, el la ĉielo, sur kiu ŝi eterne staras, kiel asteroido (No 172, Baucis).

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio  
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

## Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

### Raymond Schwartz – la serioza humoristo

**E**n la jaro 1926 aperis en Parizo malgranda libro, titolita Verdkata testamento. La titolo estas aludo al Esperanto-kabaredo, nomita Verda Kato, kiu tiutempe floris en Parizo sub la gvido de la verkinto Raymond Schwartz. La libreto enhavas pli ol sepdek



humurajn versaĵojn, lerte ritmajn kaj rimajn, kio faras ilin eminenta taŭgaj por kabareda prezento. La

Esperanta literaturo ekhavis sian unuan humoriston.

Raymond Schwartz naskiĝis en 1894 en la urbo Metz en la provinco Loreno, kiu en tiu tempo estis sub germana rego. Li lernis Esperanton kiel junulo kaj fondis esperantistan societeton en Metz, tiam nur 19-jara. Baldaŭ poste li translokiĝis al Parizo kaj fariĝis unu el la ĉefaj portantoj de vigla esperantista vivo en tiu urbo. Per siaj sprito-riĉaj verkoj, poeziaj kaj prozaj, li donis novan dimension al la Esperanto-kulturo en la intermilitaj jaroj. Al tiuj verkoj kaj la kabaredista aktivado de Schwartz ŝuldiĝas la siatempaj kliŝaj ideoj pri li kiel epikuristo, t.e. malserioza vivĝuanto kun vivbotelo, mokpikema kaj karikaturo. Sendube, multe kontribuis al tiu mito la rimporeteto, kiun verkis pri li Kalocsay:

*Jen Raymond Schwartz, kun vivbotelo*



*la ĉarma an' de Epikur'...*

Sed tia karakter-skizo trosimpligas la veron pri tiu rimarkinda homo. Li estis esence serioza pensulo, kiu laŭnature ŝatis simplan neartefaritan vivon.

La verkista agado de Schwartz estas dividebla en du partojn: la "kabaredistan", grandparte poezian, kaj la pli seriozan, prozan parton. Post Verdkata testamento sekvis pliaj humurecaj libroj: La stranga butikoj, La ĝoja podio, . . . kun siaspeca spico. La celo de tiuj verkoj estas amuzi. Pri La ĝoja podio la aŭtoro anoncas antaŭparole: "Nur unu ambicion ĝi havas: "Amuzi vin, por juste meriti sian nomon."

La proza parto de la verkista agado de Schwartz konsistas ĉefe el lia novelaro kaj du romanoj. La romano Anni kaj Montmartre (1930) rakontas la aventurojn de germana knabino en Montmartre, kvartalo en Parizo, fama pro siaj kafejoj kaj noktoklubo. La junulino sentas sin forlasita kaj iom perdiĝinta, tiel ke la aventuroj de la junulino estas iom malgajaj. La rakonto tamen estas sprita kaj esprime eltrovema, kiel ĉiam ĉe Schwartz. Fakte la "aventuroj" de la germanino estas, unuavice, okazo por priskribi la vivon en tiu fama kvartalo dum la jaroj 1920-1930.

La ĉefverko de Schwartz estas la granda romano Kiel akvo de l' rivero, kiu aperis en 1963, dek jarojn antaŭ lia morto. La titolo simbolas tiun vidpunkton de la aŭtoro, ke ordinaraĵoj homoj neeviteble devas iri sian vojon, destinitan de la cirkonstancoj, kiel la fluanta

akvo de rivero. Iom pli precize, la temo de la romano rakontas la sorton de ordinara homo, kiu nevole devas partopreni du militojn. Li sekvas la fluon, ne klopodas, fakte ne kapablas naĝi kontraŭ ĝin. La rakonto trovas sian ekmovan forton kaj la okazajn sekvojn en la siatempa situacio de la naskiĝa regiono de la verkisto, kie francaj kaj germanaj influoj estas intermiksitaj en la vivo de la homoj. La rakonto estas realisma, sed ĝi profitas ankaŭ el la bonhumora spriteco de la aŭtoro, kiel validas ja pri ĉiuj liaj verkoj.

Kredeble la noveloj de la Schwartz estas legmaterialo pli alirebla por junaj esperantistoj sur la lingva vojo de progreso. Kompletaj kolektoj de liaj noveloj aperis en 1971 sub la titolo Vole . . . Novele, ĝi enhavas 35 novelojn. Stile perfektaj, lingve sukaj, teme malenuigaj, estas tiuj noveletoj. Antaŭtekste la aŭtoro citas konatan sentencon de la franca poeto kaj kritikisto Boileau, ke "en literaturo ĉiuj specoj estas bonaj, ĉiuj krom la . . . enuiga", kaj li anoncas, ke li ne havis alian celon ol eviti tiun lastan. Kaj precize tiaj estas la noveloj de Schwartz: malenuigaj – sekve bonaj. Efektive, tia mallonga priskribo validas ĝenerale pri la tuta verkaro de Raymond Schwartz, la serioza humoristo.

de **Baldur Ragnarsson**

Juna amiko, n-ro 99, 2001

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/schwartz.html>

## Feliĉan jubilean naskiĝtagon al nia kara amiko kaj kontribuanto Petar Todorov el Bulgario



Karaj amikoj,

modelan galeron kaj mi sendas foton;

Dankegojn pro la rimarkinda Turka Stelo - inda produkto de via majstreco! Por mi ĝi estas vera abelujo de la verdaj abeloj - la geesperantistoj el la tuta mondo! Kaj nia amiko Carmel Mallia el Malto

La rakonto de mia itala amiko Norberto Saletti pri la Insulo de la Rozoj;

La nelacigebla aktivulo-albano Berthyl Selimi - tradukisto kaj matematikisto;

De kara amiko Vasil Kadifeli el Turkio, la belegaj tradukoj de versaĵoj kaj kantoj de/pri la neforgesebla mondo ŝatata Mikis Teodorakis (eternan memoron), kiuj kortuŝe larmigis min! Kiu ne scias la kantojn kaj dancojn en filmo "Zorba la Greko"?!

La ĉarma pentristmajstro el Germanio Helga Plotner rabis mian koron per sia mirinda bildo "Antaŭurba laĝeto"! Gratulojn, estimata - mi ege ŝatas havi kopion malpli grandan;

Speciale mi deziras gratuli mian amikon kaj kunaktivanto Renato Corsetti pro lia profunda sindonemo al Esperanto - movado kaj lia 80-jara jubileo!

Je la 8-a de decembro mi levos plenan glason kun kvalita vino okaze mia 80-a jubileo kaj trinkos por sano al ĉiuj geamikoj kaj speciale por longa daŭra sukceso kaj plua elkresko de Turka Stelo!

**Petar Todorov** – Sofio, Bulgario

pravas dirante, ke "gustumante ĝian mielon ni pliriĉigas nian kulturon per arto, filozofio, matematiko, historio, pentro- kaj kino-artoj".

Nedetruenda ekzemplo pri tio estas la brilantaj gemo-verkoj de Spiros Sarafian kaj Kostas Kiriakos pri la helena mitologio el Grekio;

La majstreco de Konuralp Sunal el Turkio pri filma analizo;

Carmel Mallia el Malto kun siaj ĉarmaj rakontoj versaĵe kaj speciale gratulinda tradukaĵo pri la mezepoka turka sultana galero. Ĝi tuŝis mian koron ĉar mi ekposedis similan

**Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo**

**Historioj kaj maloj**

**Fabeloj pri viro kaj virino**

**La virino sur la pramo (parto 1)**

Mi venis al Istanbulo nur por unu tago por partopreni la enterigon de turka amiko, kiu, mirinda aktoro, alttalenta lirikisto, dum certa tempo apartenis al miaj plej intimaj rilatoj. Ankoraŭ junaĝa, li kelkajn tagojn antaŭe mortis pro la sekvoj de aŭtoakcidento. La enterigo okazis en la Granda Tombejo de Üsküdar, je la azia bordo de la urbo, kie E. kun sia edzino kaj siaj infanoj dum la lastaj jaroj loĝis en malgranda domo. Estis nebuleca dimanĉmateno en frua septembro; peza sufokiga vetero premis evidente jam de pluraj tagoj super la plumbe griza Bosporo. Nekonata al la funebra komunumo kiel ankaŭ al liaj plej proksimaj amikoj, mi tenis min iom kaŝite en la fono kaj ne partoprenis la veran entombigan ceremonion. Nur kiam la kunveno estis dissolviĝinta, mi alpaŝis sole la tombon, antaŭ la ĉerkon superŝutitan de floroj kaj kapvestaĵoj kaj memoris la feliĉajn kunvenojn dum lia restado en Germanio, kiuj farintis nin nesebareblaj amikoj. Nur nun superis min funebro kaj adiaŭa doloro, krome la amara sento, ke dum la lastaj jaroj mi ne sufiĉe okupiĝis pri li.

Horon poste mi forlasis obtuze kaj sen rigardo la tombejon kaj repaŝis al la pramo, kiu ligas la azian parton de la urbo kun la eŭropea kaj proksime de la altoponto traveturas la trankvilan marbrakon. Absorbata de funebro kaj malĝojo, mi apenaŭ perceptis la fremdan, gravan ĉirkaŭon kaj nur svage, ke malmultaj flughoroj translokigis min dehejme en la orienton. De la fama Ora Urbo mi vidis ĝis nun nur la plej aĉajn grizaĵojn de la novkonstruitaj kvartaloj. Tiel ankaŭ eblis, ke sur la ferdeko de la pramo iu de kelka tempo tenis sin konstante ĉe mia flanko, ja staris preskaŭ kiel apartena apud mi, sen ke mi tion tuj rimarkis. Nur kiam la pramo alboridiĝis sube de moskeo kaj la pasaĝeroj jam kolektiĝis ĉe la elirejo, mi vidis sub mi la karnokolorajn, matlakitajn duonŝuojn, kiuj konfide akompanis min, ilian fajnan, aĵuran langon, poste ankaŭ la netravedeblajn bejajn ŝtrumpojn, la trikvarone longan, malhelbrunan jupon kun ludeca flankfaldo - kaj ne pli; ĉar mi troviĝis en animstato, kiu ne volis permesi al mi plian levon de la kapo, eĉ se mi havintus la volon por tio, kaj eĉ tute ne por interesiĝi pri ia fremdulo. Sed

kiam mi forlasis la pramon, mi devis konstati, ke la karnokoloraj ŝuoj elaste adaptiĝis al miaj paŝoj. Mi paŝis sur la placon antaŭ la albordiĝa ponteto, kaj ili estis daŭre apud mi, kvankam la grapolo da pasaĝeroj, kiu antaŭe nin kuntenis, delonge dissolviĝis. Mi haltis, kaj same kondukis la sveltajn, nekonatajn kruojn vestitajn tute ne laŭ la landa gusto. Komuna haltado, komuna plupaŝado, kaj tio en tiom senemocia agordo, kvazaŭ ĉi tie du homoj farintus jam multmilajn paŝojn kune! Sed en tiu momento ne estis mia afero miri pli ol funebri. Kaj pro tio tiu kunema akompano ne povis kaj ne rajtis ĉesigi mian meditadon, mian memoradon. Tamen estis ja mistere, kiel tiuj adaptitaj paŝoj enlulis min en senton de konfido kaj profunda konateco. Kvazaŭ niaj ritmoj - ĉirkaŭirante kutimon kaj vivodaŭron - trovintus sin tiel profunde, ke ni nun tuj plenumis la karakteron kaj kondutmanieron de longjara aparteneco. Ĉar ne la nekonatino kondukis aŭ delogis min, tiel malmulte kiel mi tiris ŝin kun mi, sed niaj interkonsentitaj paŝoj aldirektis memtrovitan celon. (Tio cetere ne povis esti mia hotelo, kiu troviĝis sur altaĵo ĉe la centra Taksim-placo, dum nia vojo kondukis nin en la ebenejo, laŭ la Bosporo, evidente al antaŭurba kvartalo.)

Post ioma tempo mi sentis, ke la plej amara funebro iomete mildiĝis, la pentokramfo iom malpli intensis. Eĉ spuro da konsoliĝo aperis, nome ke mi en fremdlando, dum tiu peza kaj aĉa tago ne tutsole paŝis tie kaj ke mi, kvankam en malklara maniero, ne bezonis plu zorgi pri io ajn. Almenaŭ tiom longe, kiom daŭros tiu ĉi profundkomuna, senpretenda irado. Tamen mi kiel antaŭe ne estis en la animstato por rektigi mian kapon. Kiel iu, kiu pro rigidiga nuko devas konstante kurbiĝi, mi simple ne kapablis levi la rigardon pli alten ol al ŝiaj genuoj por fine vidi tiun hazardan, praintiman personon.

Sed montriĝis, ke almenaŭ al ŝi la celo estis antaŭe konata, kiun nur ŝajne mem elektis la regulcirkvito de nia reciproka akompano. Ĉar post ioma tempo estis ŝi, kiu haltis por transiri la straton, kaj mi sekvis ŝin nun jam senvole. Ni atingis baldaŭ domon iom retiritan, kies altecon kaj amplekson mi sen suprenrigardi ja ne povis pritaksi, sed temis certe pri unu el tiuj du- ĝis trietaĝaj konstruaĵoj, modesta eldono eble de tiuj malbelaj, malkaraj betonkuboj, kiuj esence kontribuis al la seniluziiga impresio, kiun faris al mi la urbo de la sultanoj, odaliskoj kaj pompaj fabeloj.

La ĉambro, kiun ni poste eniris tra neŝlosita vitropordo, similis al la drinkejo de iama kafejo; ĉiukaze



ni preterpasis dekstre verŝotablon, super kiu lumis malgraŭ la sufiĉa taglumo laktoblankaj neontuboj. Mi vidis vicon da aĉe plastaj taburetoj stakitaj unu sur la alia, mi vidis sub mi rompitan linoleoplankon, gazetoj kaj elektraĵoj kuŝis dise sur la kota planko kaj nombro da aliaj restaĵoj indikis, ke tiu ĉi gastejo jam certan tempon ne plu ĝuis publikan uzadon. Mia gvidantino - kiel mi nun tamen devas nomi ŝin - surpaŝis spiralan metalŝtuparon, kiu atingis superan etaĝon, ŝi nun senhezite antaŭiris min, nenio restis plu de egaleca akompano. La ĉambro, kiun ŝi tuj poste malfermis al ni, troviĝis, kiom mi kapablis percepti, en pli ĝojiga stato ol la malzorgita drinkejo de la enira teretaĝo. Ĉi tie ĉio almenaŭ faris la impreson de zorgema kaj freŝa flegado. Nedubeble ĝi estis meblita laŭ centreŭropa gusto kaj preskaŭ unuece aranĝita en hela abrikota tono. Tapetoj, tapiŝoj, kurtenoj ludis en similaj, fajne variitaj desenoj. La fenestro, kiu laŭ mia supozo montris al interna korto aŭ ĝardeno, estis kovrita per duonfermita ĵaluzio. El la malluma, per inerta fulmotondro peze ŝarĝita ĉielo elpikis kelkfoje blindigaj sunosagoj, kiujn oni sentis rekte venenaj.

Post nia apudema migrado ni staris nun subite dividitaj, atinginte abruptan senmovecon en tiu ĉambro, kaj la timata momento, en kiu oni paŝas unu fronte al la alia, estis apenaŭ plu prokrastebila. Mi sentis min subite tre sola kaj hontigita. Mi ne scias, ĉu ŝi rimarkis mian ĝenatecon - mi klinis ja senŝanĝe la kapon, kvankam intertempe malpli pro la funebro ol pro inhibicio kaj fremdiĝo. Ĉiukaze mi subite sentis ŝiajn fingropintojn sub mia mentono. Ŝi provis levi ĝin. Post unua rigida rezisto mi baldaŭ ne povis plu nenion ol milde cedi. Sed kiam fine mia frunto malrapide rektiĝis, tiam ankaŭ samtempe, sen mia volo, miaj palpebroj fermiĝis, ĉar forta, varma spiro trafis min, malfermitaj lipoj sekvis kaj la tuta vizaĝo estis al mi fermata de alia. Niaj kapoj cirkulis jam ĉirkaŭ la buŝo, sed mi daŭre vidis la karnokolorajn ŝuojn iri, aŭdis la fortikajn kalkanumojn frapi. Nun miaj brakoj, manoj, genuoj dissolvis sian rigidecon, kaj mi faris ĉion, kion postulis de mi la rapida interŝanĝo de tuŝoj. Mi ĉirkaŭvolvis, kiel mi estis ĉirkaŭvolvata, kaptis, kiel mi estis kaptata,

premis, kiel mi estis premata. Iu, kiu ne konas la homan amludon, povintus interpreti nian umadon eble kiel la absurdan klopodadon, iel loki ĉe si la alian kiel absolute nemanipuleblan aĵon; same kiel kelkfoje klaŭno traktas supermezuran rekviziton.

Sed subite ŝi interrompis nian tumulton kaj malproksimiĝis de mi. Nun mi devintus vidi ŝin, sed ne estis kapabla por tio, ĉar la lumo de miaj okuloj flagris, la pupiloj ruliĝis tiom emocie ĉiudirekten, kvazaŭ mi troviĝus meze de sonĝoriĉa dormfazo. Nur tremantan silueton mi ekkonis kontraŭ la fenestro kaj ke ŝi metis la fingron sur la lipon, kvazaŭ ŝi volus silentigi min; kvankam ĝis tie ni ne interŝanĝis eĉ unu vorton. Sed ŝi eble celis, ke mi iom haltu mian ekstazon. Kiel faris ŝi, ankaŭ mi demetis nun ĉian vestaĵon. Ŝi forigis kusenojn, ludilojn kaj kovrilon de ŝia lito, kaj ni ree iĝis unu ĉe la alian.

Imagu mian miron, kiam ŝi neatendite alparolis min en mia lingvo kaj taskis min per severaj flustradoj pri kion mi faru por la plezuro de ŝia bela korpo. Apenaŭ mi povis sufiĉe miri pri ŝiaj vortoj, jen jam postsekvis la ĝuindaj surprizoj de ŝia fordon, kiuj ne plu toleris sobran demandon nek feliĉofremdan vorton. Ĉiam pli malmola, ĉiam pli vira, ĉiam pli nefleksebla fariĝis nia agado kaj el profunda preparo nun por ni ambaŭ proksimiĝis la venko. Tremego el ŝia propra praforto venis super la forta virino, preskaŭ senindulga tremado, kvazaŭ ŝi perdintus ĉian rilaton kun mi, kaj mi, kiu kisante defalis kiel matura frukto, mi sinkis super la randon en senkonscian profundon kaj vidis ŝin, en la alteco, larĝe, tre larĝe klinita super la putorandon, vidis falante fine ŝian vizaĝon.

(daŭrigota)

<sup>1</sup> *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/Strauss2.html>

17>> rapide ekpaŝis, kvankam ege volis diri al la Pizo, ke pro li nenion ŝparus en la tuta mondo, eĉ sian vivon.

Kaj Pizo ŝajnis ĉion forgesi. Li ruliĝis iomete postrestinta kaj malkuraĝe rigardadis ĉiufanken.

- Ĉu ree kulpas birdoj? – silente demandis Glano.

Pizeto kapjesis kaj diris:

- Mi ankaŭ Araneon timis, sed nun tio aspektas komike.

- Ekzistas ja diversaj maltaŭguloj,- peze ekspiris Kverkido.

- Vere ekzistas kaj krome ili muŝojn kaptadas, - konsentis kun li Pizeto, kaj saltinte supren, iel transruliĝis tra kurbiĝinta agrostido.

(daŭrigota)

*"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj"* estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Dumnokte iris Lup' al korto ŝafa,  
 Sed estis li maltrafa:  
 Erare venis li al hunda kort'.  
 Pro veno de grizul' alarmis tuta stalo,  
 Ekbojis la hundar' kaj strebis al batalo.  
 "Rabisto jen! "alvokis kria Vort', —  
 Kaj tuj fermiĝis korta pord'.  
 Momente la hundej' fariĝis la infero.  
 Jen kuras homoj kun baston-armil',  
 Jen kun fusil',  
 Jen flagras torĉoj en tremanta bril'.  
 La Lupo en angul' sin premas en mizero,  
 Kun tima dentoklak' kaj kun kuspita fel';  
 Li manĝus ĉiujn certe en krUEL',  
 Sed li komprenas nun, ke mankas la espero.  
 Ke fine venis venĝa hor'  
 Por ĉiu ŝafa plor', —  
 Do la ruzulo kun fervor'  
 Ekdiplomatas:

"Amikoj miaj, kial estas bru'?  
 Mi estas via frat', nur frat', - nenio plu.  
 Por paco venis mi, pri tio mi konstatas.  
 Forgesu pri pasint', ni vivu en fortun'.  
 La ŝafojn en kampar' ne tuŝos mi de nun,  
 Kaj zorgos kiel frat' pri ŝafa oportun', —  
 Kaj ĵuras mi per lupa vort' impone,  
 Ke mi..." — "Aŭskultu vi, najbar',"  
 Ĉasist' rebatis al deklar':  
 "Vi estas ruza best', sed mi kun griza har',  
 Naturon lupan konas mi tre bone.  
 Preferas mi kun Lupo, la sinjor',  
 Pritrakti pacon laŭ kutima mor':  
 Post kiam lia felo estos for'.  
 Kaj hundojn kontraŭ Lup' ellasis li rezone.


verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
 tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)  
 Ukrainio

## André MALRAUX

## tradukis kaj sendis Roland Platteau el Francio

« elĉerpaĵoj el *Antimémoires* »  
 (kontraŭmemoraĵoj)

Vero ?



Marburg, en Leipzig, en Berlino.

Mian unuan libron, "La konkerantoj", Die Eroberer, algermanigis Max Claus.

.....

... mi admiras la balbutbruon kristanan, kiu estis ade kovrinta tiun teron, sur kiu mem mi probable baldaŭ kuŝos - sed mi ne kredas je ĝi. Memorado je Sankta Johano pli fortas kontraŭ malfeliĉo, ol ties ĉeesto kontraŭ morto. Nu, en kiu orienta teksto ĉu mi legis: « La mondsenco tiom neatingeblas je la homo, kiom stirado de reĝaj ĉaroj je la skorpioj, kiujn tiuj diskrevas » ? Ĉio estas, kvazaŭ plejalta valoro mia estus la Vero – kaj tamen kiom gravis tiunĉinokte la

1944, Malraŭ estas ĉefo en la "Résistance" batalado kontraŭ la okupaciantaj germanoj. Vundita, kaptita, li certis, ke baldaŭ li estos mortpafita.

- Kio estas via profesio ?

- Profesoro, kaj verkisto, mi prelegis en viaj universitatoj, en

Mia paseo, mia vivrakonta vivo havis neniom da graveco. Mi ne pensis mian infanaĝon, mi ne pensis miajn familianojn. Mi pensis la ateajn kamparaninojn, kiuj salutis al miaj vundoj per krucosigno, la lambastonon alportitan de la timema kamparano, la kafon en la Hotel de France kaj tiu de la ĉefmonaĥino. Ĉe mia memoro restis nur la fratecaĵoj.

En tiu silento monaĥeja, kie konjekteble estis dume preĝata por mi, kaj kiun marteladis la movoj malproksimaj de iu tanko, eĉ kiam mi pensis pri la skorpioj Babilon-aj, tio, kio vivis en mi tiom profunde, kiom proksimigo de morto, tio estis tiu kareso malespera, kiu fermas la okulojn de mortintoj.

.....

En Albi ...la gardsoldato sidvenis apud min, kaj eligis el poŝo du fotojn : Marŝalo Pétain kaj – tio ekmiregis min – Generalo De Gaulle. Fingro sur Pétain : « Tre bone ! » mallaŭde sur De Gaulle : « Teroristo ! » Li rigardis al mi. Mi atendis la sekvon. Li levis fingron por atentigi, diris : « Morgaŭ » kaj mallevis ĝin sur De gaulle « Eble : tre bone ? » poste sur Pétain : « Eble, teroristo ? » faris geston, kiu signifis ĉu oni eble scias ?

**André MALRAUX**

esperantigis **Roland Platteau** el Francio  
 (5-a de marto 2005)



### Perfektaj globoj

La propono de Rudi ne estis senefika. Ĉiu obeis kaj faris sian hejmtaskon. Do ili certe kapablis prezenti interesan aferon por la aliaj. Jens tuj komenciĝis kun sia temo, eĉ antaŭ ol la kafo estis servita :

„Mi povis traserĉadi la interreton dum horoj! Oni tute ne plu bezonas televidon!“

Karl scivoleme demandis: „Kion vi trovis? Aŭ ĉu mi komencu nun?“

Sed Jens ne permesis esti forpuŝita de sia favorpozicio kaj fiere raportis pri la 'perfektaj globoj'.

„En la jaro 1930 farmistaj laboristoj trovis misterajn ŝtonajn globojn en la ĝangalo de Kostariko. La aĝo de tiuj trovaĵoj estas verŝajne kelkmiloj da jaroj. Ili konsistas el granito. La plej grandaj havas diametron de pli ol du metroj. Neniu scias kiu produktis tiujn globojn. Krome la sciencistoj ĉiam ankoraŭ ne povis klarigi kiel la kreintoj povis labori tiel precize. Ili vere estis kapablaj metiistoj.“

Karl tuj interrompis rimarkinte: „Jes, mi ankaŭ legis ion pri tiaj globoj. Oni trovis ilin en Bosnio. Sed ili ne konsistis el granito. La pezo de la plej granda estis 30 tunoj. Kelkaj sciencistoj opinias, ke tiuj globoj estas la produkto de iu progresema civilizacio. Aliaj pensas ke la globoj ankaŭ povis esti nature kreitaj per speciala minerala formado. Kiu pravas?“

„Nun, ja, tiu estas interesa, sed kion oni povas fari per tiaj globoj?“, demandis Rudi. Li evidente ne tre ŝatis tiun temon. Sed Jens daŭrigis sian rakonton. Li eĉ aludis eblajn rilatojn kun la insulo 'Atlantis', pri kiu jam la grekoj raportis. Li finis kun la propono, trakti tiun temon dum la venonta rondo.

### Atlantis

„Ĉu estas loko?“, demandis Gerd. Sen atendi respondon li metis kafotason kaj platon kun bulko sur la tablon kaj tuj komencis matenmanĝi.

„Ho, li vere malsatas!“, rimarkis Karl aldonante „Kompreneble, vi rajtas sidi ĉi tie. Sed ni havas fiksan programon. Eventuale ĝi estas interesa ankaŭ por vi. Ĉi tie oni kunvenas ne nur por plendado!“

Gerd ne lasis sin ĝeni kaj daŭrigis maĉi la bulkon. Dum tio Karl klarigis, ke ĉiu el la rondo devas prepari

novan temon por la venonta kunveno.

„Hodiaŭ estas mia vico“, proklamis Rudi. Li estis preparinta la temon 'Atlantis'.

Unue li rakontis tion, kion verŝajne ĉiu de la ĉeestantoj jam sciis. Atlantis estis paradiza insulo kun mirindaj arbaroj, kun temploj kaj palacoj ornamitaj per oro. Sed pro giganta naturkatastrofo Atlantis malaperis dum nur unu nokto. Ĉiuj loĝantoj pereis, dronigitaj de terura tertremo.

„Kaj hodiaŭ neniu scias, kie situis Atlantis. Povas ja esti, ke la tuta rakonto estas nur fabelo. Kiu skribis ĝin?“, demandis Gerd, kiu intertempe estis formanĝinta sian bulkon.

Rudi ĝojis pri tiu rimarko, ĉar li ja bone preparis sin.

„Estis Platono, la greka filozofo, kiu vivis ĉirkaŭ 400 jarojn antaŭ Kristo. Li estis verŝajne la unua, kiu verkis tekston pri Atlantis. En liaj skribaĵoj troviĝas la informo, ke Atlantis pereis jam 9600 jarojn antaŭ Kristo. Do, estas longa tempo. Kiu scias, ĉu estas la vero. Multaj homoj dubas ĉu Atlantis vere ekzistis. Tamen, ankaŭ hodiaŭ la homoj ne forgesis la rakonton.“

Rudi havis ankoraŭ pliajn informojn. Laŭ la rakonto de Platono Atlantis ne nur estis insulo, sed tuta kontinento. Al tiu apartenis pluraj insuloj. La loĝantoj de Atlantis estis tre riĉaj kaj disponis pri forta surmara potenco.

La atlandidoj regis super vastaj partoj de Eŭropo kaj Afriko. Ili eĉ militis kontraŭ la grekoj. Sed finfine la grekoj venkis. Tio estis, laŭ la grekoj, dia puno pro ilia avaro.

„Ĉesu, ĉi tio nur estas fabelo. Ĉu oni entute iam trovis ion? Kaj kie situis Atlantis?“, demandis Gerd senpacience.

„Tion ni ne devas klarigi ĉi tie, ĉar ĉiu ja scias tion. Certe tio estas la Bermuda triangulo!“, rimarkis Karl.

Baldaŭ aperis pliaj proponoj. De suda Hispanio ĝis Norvegio. Eĉ Gronlando kaj la Antarkto estis menciitaj. Rudi kompreneble ne povis doni certajn informojn. Eĉ ne estis sufiĉa tempo por nova taso da kafo. La rondo disiĝis. Oni konsentis pri nova temo por la venonta semajno.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio  
(plumnomo Erik Tantal)

fonto: <http://esperanto-klaus.de/>





Bayram Karaboli

(daŭrigata)

li ekiris al la hejmo de Vera. Kiel ĉiam surpiede. Dumvoje Fatmir kaptis ŝian manon kaj neniam lasis ĝin. Kiam Vera, tutgaje kaj ne eltenante la ridadon, estis rakontante pri la fuŝaĵo farite tiutage de profesoro de matematiko, Fatmir, neatendite, iris antaŭen, kaptis ŝin milde ĉe ŝultroj kaj ekrigardis ŝin kvazaŭ li volus engluti, forkaptita de neeltenebla impeto je sopiro kaj amo. Ŝia kapo enfalis tuj sur lia kolo. Fatmir eksentisla kolon malsekiĝi pro varmaj larmoj. Kaptis permane tiun belan kapon plene transdonite, levis ĝin fronte al sia vizaĝo kaj kisis la larmojn. Kaj sentis ke ili ne estis ja larmoj. Estis perloj de feliĉeco. Tiam li ne plu eltenis sin. Liaj lipoj trovis ŝiajn lipojn brogantajn kaj kisis ilin.

Vera forte enamiĝis. Estis ia "coup de founder", kiel diras francoj. Granda amo, vera amo kiu frapis ŝin neatendite. La tuta mondo ŝia skuiĝis kaj ŝanĝiĝis, kiel ŝanĝiĝas la reliefo de iu tera surfaco, frapita de forta tertremo. Fatmir por ŝi ne estis ja la blua princo de fabeloj. Ŝi apenaŭ memoris sonĝi tiajn revojn. Li estis sufiĉe pli. Estis la tuta sia virga mondo. Mem sia feliĉeco. Nun ĉion ŝi faris facile kaj plezure. La patrino tuj komprenis tion okazinta al sia filino kaj demandis. Ŝi rakontis. Kiam la patrino kisis ŝin, Vera esploris pro ĝojo kaj feliĉeco.

Fatmir fariĝis kara knabo de la hejmo. Tagon de lia ekveturado al Albanio por pasigi la somerajn feriojn, lin kondukis ĝis la stacidomo la tuta familio. Vera ploris kiel infano. Kelkfoje ili interparolis per telefono kaj interŝanĝis leterojn. Vera eklernis la albanan kaj atendis senpacience la revenon de Fatmir, sed ankaŭ la librojn kunportotaj de li pri tiu kara lingvo. Malgraŭ ke post monato pasigite familie ĉe Balta marbordo, ŝi pensis ke la ferioj tro longis.

La reveno de Fatmir feliĉigis tutan Varsovion. Tiel diris al li Vera karesante liajn nigrajn buklojn.

Vera aliĝis al Fakultato de Filologio kaj Beletro. Ili apenaŭ sentis kiel pasis tiu lernejar-jaro. Alvenis junio. Alvenis la ekzamenoj. Fatmir kvitiĝis kun ĉiuj ekzamenoj kaj sentis sin kvazaŭ li estis konkerinta la tutan mondon. Vera estis fininte pli frue kaj atendis tutangore. Kion ŝi ekspektis? Foriru al Albanio. La patrino iom hezitis. Kio okazos al ŝiaj studoj? Ankaŭ en Albanio estas tia altlernejo, dirintis la patro. Kaj decidite.

La disiĝo kun la proksimuloj kaŭzis dolorojn. Tamen la malĝojo apenaŭ sentiĝis en la dolĉa maro de la feliĉo.

Tiujn somerajn noktojn, dum la vojaĝo perŝipe, ili dormis malmulte. Ili staris surkaje kaj iliaj babiladoj neniam finiĝis. Vera, emociiĝinte, uzadis tutan fantazion por imagi la landon kien ŝi veturantas, kiu fariĝus ŝia dua patrio kaj de ŝiaj gefiloj.

lun nokton, kiam ĵus krepuskiĝis, Fatmir montris al ŝi du stelojn okcidente. Unu estis pli granda kaj la alia malpli granda. La distanco inter ili egalas al unubraketendiĝo.

- Rigardu atente – diris Fatmir. Ili ĉiunokte proksimiĝas malrapide unu al la alia. Tiom malrapide, kvazaŭ oni ne povas dedekti ilian moviĝon. Kvazaŭ ili iras al kaŝita loko. lun nokton ili renkontiĝas Nur ununokte. Poste denove disiĝas kaj malproksimiĝas tiel malrapide kaj tiel ne rimarkite, kiel ili proksimiĝis. Do, ĉiu el ili daŭrigas sian vojon.

Vera sentis tremon. Ŝi sekvis atenteme tiujn stelojn dum la vojaĝnoktoj. Envere tiel okazis. Sin kunpremante al Fatmir, ŝi diris malfortvoĉe:

- Kiom trista. Kial okazi tiel?

- Estas nur legendo. Ĉu ci volas ke mi rakontu? - diris Fatmir ĉirkaŭbrakante kaj kicante la liprandojn, kvazaŭ volis trankviligi aŭ protekti ŝin de io malbona.

- Ne, mi ne volas - diris Vera kaj sentis sin debile pro tiu nerakontita dramo.

Estis frumatene, kiam la ŝipo alproksimiĝis al Durres. La horizonto antaŭe estis arde oranĝkolora. Kvazaŭ la ŝipo ekdronus en flamenco. Kaj poste, kio okazus? Ŝajnis tio kiel fabela vojaĝo.

Jen, videbliĝis la montetoj kaj poste la urbo dronita en la maldika membrano de la aŭrora nebulo.

Vera estiskonkerita de ia angora ĝojo. Estis enirante novan mondon. Novan vivon. Krom Fatmir, ĉio cetera estis nekonata por ŝi. La centro de ĉi tiu mondo



por ŝi estis Fatmir. Kaj ŝi ne disiĝus de li. Alie estus perdinta.

- Jen la patrino kun la frato- diris Fatmir fingromontrante.

Avertite, ili venis atendadi.

Fatmir estis parolinte multe al ŝi pri siaj homoj, precipe pri patrino, debila punkto por li. La patro mankis. Li estis mortinta, kiam Fatmir estis ankoraŭ etulo. Li estis rakontinta same pri la familiaj moroj en Albanio kaj pri tiuj en lia hejmo.

- Kie estas la patrino? Demandis senpacience Vera.

- Jen ŝi, tiu altstatura virino, vestite per nigra kostumo. Ĉu ci vidas? Apude estas la frato. Tiu kun blua ĉemizo. Li ne similas al mi. Jen nun li kaplevis.

- Jes. Nun mi vidas ilin- diris emociplene Vera kaj levis la manon por saluti ilin.

Vera, ne forlasis la brakon de Fatmir, kiu kun du pezaj valizoj enmane kaj kun okuloj direktitaj al la proksimuloj, antaŭenpaŝis tra la homamaso.

Alvenis antaŭ ilin kaj haltis dum konfuza momento krucigante la soifajn kaj sopirajn rigardojn.

- Ĉu la junedzino? Oh, mia trezoro!- kaj panjo Dilja kisis Vera-n kaj kunpremis al sia brusto kvazaŭŝi estus sia filino, kiun ekde jaroj ne estis vidinta. Poste, ne ellasante ŝin, foriĝis iomete malantaŭen kaj rigardante scivoleme kaj amece, kun okuloj larmoplenaj pro la ĝojo, ĉirkaŭbrakis kaj denove kisis ŝin. Karesante la orajn harojn de Vera, ŝi alparolis Fatmir:

- Miri, mia filo, kie vi trovis ĉi tiun belegan feinon? Ŝi estas envere tia, ĉu ne?

Vera komprenetis albane, sed en tiaj situacioj kaj rilatoj la homoj interkonsentiĝas tre bone. Pro la varmaj vortoj de ĉi tiu albana patrino kaj precipe pro la libera kaj sincera konduto ŝia, la fremda knabino tute liberiĝis kvazaŭ per ia sorĉo disde tiu ŝarĝo da konfuzigaj sentoj kio estas normala en tiaj kazoj. Ŝi tuj sin sentiĝis en la sino de konataj kaj karaj homoj.

La familio de Fatmir vivis en urbeto profunde de la lando. Tio kio ravigis Vera-n dum la vojaĝo al tiu urbeto, estis la krutaj montoj kaj impeta rivero kiu jen malsupreniris bruege kaj jen daŭrigis la vojon trankvile, murmurante nekonatan melodion por ŝi. La nova domo estis surtera kun kvar ejoj kaj korto. Estis ĝi modesta, sed oni rimarkis ke la homoj zorgis pri ties bontenado. Tiun nokton la domo pleniĝis je ĝojo kiel rarfoje. Panjo Dilja sidigis la junedzinon ĉe la tablokapo, kion ŝi meritis kiel alveninto de fora lando, klarigis ŝi kaj mem eksidis apude. La du etaj filinoj de la frato de Fatmir komence kondukis timemaj kaj hontis alproksimiĝi al la juna virino. Vera alparolis ilin per la albana nekonata al

ili kaj petis ĉirkaubrakii. Ili ruĝiĝis kaj ekridis tutnaive, poste alproksimiĝis kaj ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ne plu volis disiĝi de ŝi.

- Aŭskultu vi ambaŭ- eldiris iom poste panjo Dilja, sin turnante al Vera kaj Fatmir.-Ni estas decidinte okazigi nuptofeston. Ni jam pretigis nin kaj okazigos ĝin venontan dimanĉon. Estos ankoraŭ semajno antaŭe por ke plenumi ion ajn vin bezonatan.

Fatmir rigardis al Vera kaj plena je seriozeco diris:

- Nu, kion ci dirus? Ĉu ci vidus albanan nuptofeston?

Vera malfermis la okulojn kaj kvazaŭ oni parolus pri alies nuptofesto, ĝojplena respondis:

- Jes!

Ĉiuj ekridis malmallice. Panjo Dilja kisis la fronton de Vera kaj diris:

- Longvivu, mia filino kaj herediĝu!

Nekompreninte ion el tiu bonaŭguro, ŝi ruĝiĝis kaj turniĝis al Fatmir, kuntirante la ŝultrojn. Por Fatmir estis iom malfacile traduki la terminon "vi herediĝu" kaj klarigis ĝin per tuta frazo.

Estis aŭtenta albana nuptofesto. Mankis nur la junedzinaj proksimuloj. Vera vestite per blanka robo de junedzineco kaj kun vualo kaj krono surkape, sin rigardis en la spegulo kaj ne povis kredi al siaj okuloj.

- Laŭ nia moro, ci devas tristiĝi kaj plori- incitis ŝin Fatmir.

- Lasu la junedzinon ĝojiĝi. Neplu estas la malnovaj tempoj- admonis lin panjo Dilja.

- Aŭskultu- daŭrigis Fatmir- Estas io serioza. Eĉ por ploradi oni uzas apartan terminon. Tio nomiĝas "katarim".

- Mi ne povas- diradis Vera sincerplene kaj ridadis tutanime.

- Ridu, mia trezoro, estas ja via ĝojo unuavice.

(daŭrigota)

rakonto de **Bajram Karabolli**  
tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

*Mi, mia edzino kaj mia filo John, feriis nur unu tagon (la 19-an de junio 2021) en la apuda belega insulo 'Gozo'. Tie mi renkontis mian kolego-poeton kaj lokanon Charles Bezzina.*



*Noto: en la foto Carmel Mallia kun okulvitroj apud la kolego-poeto Charles Bezzina.*

### Unutaga eskapo el la pandemia disturbo

Eskap'el la disturbo pandemia  
 Gozo, apudinsulo amikema  
 Afabla por la ĝojo de l'beletro  
 Kafo kontraŭ la labirinta nuboj  
 Libro por distri kaj por lerni, gvidi  
 Okulvitroj koloraj ornamitaj  
 Kaj la pajla ĉapel' pro la frenezo  
 De l'potencago de la sun' kuraĝa  
 Biero por la vojoitinero  
 Rigardoj por memfido sincereca  
 Minijupo ŝercema senindulge  
 Fumetas pipon eta maljunulo  
 Finfine por l'etos': la kafejestro!  
 Post tago tie, l'adiaŭa mano!  
 La markolo: muziko eleganta  
 De la Natur' kompleze mastrumita  
 De l'eta Gozo al l'apuda Malto  
 Mistera renkontiĝ' de du poetoj.



verkis **Carmel Mallia** el Malto  
 01.07.2021

### La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis  
**Antanas Vaitkevičius** el Litovio

#### 8. La nevenkebla Nukso

**G**lano malfermis la okulojn, skrapis ilin, sed nenion kapablis vidi. Nur alkutimiĝinte al mallumo, li rimarkis sin kuŝanta en granda per kverkaj folioj sternita arbotruo. La tuta ĉirkaŭaĵo tiel memorigis lian hejmon, ke Glano ne eltenis: du malgrandaj ardaĵoj larmoj faletis el liaj okuloj.

Subite estiĝis eĉ pli mallume. Tra la eniro de la truo Sciuro ŝovis sian kapon kaj ĵetis ion interen. Renversinte sin en aero, la malfeliĉulo bumfalis apud Glano, sed tuj saltis, ekstaris, forskuis arboputraĵojn kaj ekturnis per abau manoj antaŭ si:

- Mi montros al li!.. Per hoko el malsupre, al makzelo el maldekstro, al brovo el dekstro, - murmuris li subnaze, pugnobatante aeron.

Ekvidinte Glanon, li ĉesis, kelkfoje kaŭriĝis, profunde enspiris kaj ĝentile forpreninte verdan, sufiĉe uzdifektitan, kun zigzage tonditaj randoj ĉapelon, salutis:

- Nukso. Pli ĝuste – kvarfoja ĉampiono de la arbusto Avelarba Nukso! Kaj por amikoj – simple Nukso.

- Sed vi estas ankoraŭ tute verda, - ekdubis Glano.

- Tamen mi estas per fulmo frapita! – arogante pufigis sian bruston Nukso.

- Ha, se vi estas per fulmo frapita, jen estas alia afero, - Glano ekstaris, kunfrapis la kalkanojn kaj eltenis sian manon. – Doktoro de la verkadsciencoj kaj la inventisto de la plej dika libro en la mondo Glano Kverkido. Por malamikoj kaj amikoj mi estas Glano Kverkido.

Nukso metis siajn manojn surbruste, rondkuris ĉirkaŭ Glano tri fojojn, inspektis lin el ĉiuj flankoj, tiretis lian plumon, palpis la inkujon, fingrofrapis lian nazon kaj diris:

- Mi povas veti, ke vi ankaŭ estas la inventisto de la plej maldika libro? Ha, trafe dirita?

- Tio sen iaj ajn diskutoj videblas, - plue ŝveliĝis Glano.

- Tiuokaze ni vetu, ke Sciuro ne havas voston.

- Ne fantaziu.

- Do, ni simple diskutu: vi diru, ke neĝo estas blanka, kaj mi diros, ke ĝi estas nigra. Kiu venkos la diskuton, tiu estos konkerinto.

- Neĝo pro tio ne nigriĝos. Tio ne estas interesa. Pli bone ni pripensu, kiel ni eskapu el ĉi tie.

Nukso sidiĝis, premis sian kapon permane kaj profunde ekpensis. Poste li saltis kaj diris:

- Kia stultulo povas pensi pri tio, kio iam okazos? Se vi volas, mi povas rakonti, kiel mi ekestis ĉi-tie, kaj kiam mi fuĝos, mi rakontos, kel mi fuĝis. Ha, sprite





dirita? Mi vetas per mia ĉapelo kontraŭ via bireto, ke vi laŭ mia rakonto konstruos ĉarman libron.

- Estas verkeble, tamen, kiu legos tiajn bagatelaĵojn? – Glano rimarkis ke lia pacienco ien vaporigis.

- Ĉu al vi ne estas tute egale? Plej grava estas verkado. Mi posedas multajn spertojn, do mi ne malfruas ĉion rakonti. Ni iru interpugnobati, ĉu?

Tian reĝon de fanfaronadoj Glano estis neniam vidinta. Li sentis sin tre maloportune pro tio, ke Nukso traktas lin esti gapulo kaj sensciulo.

- Se viaj manoj jukas, gratu ilin je la muro, - respondis li kaj turnis sin for de Nukso.

- Do ni luktu.

- Miaj flankoj daŭras dolori pro la sciuraj dentoj.

- Aha! Kunpremu niajn fruntojn kaj vidu, kiu el ni sukcesos puŝi la alian for. Ha, sciencista diro?

- Se vi ne ŝparas vian kapon, frapu la muron per ĝi, - koleriĝis la kverkido.

Nukso preparkuris, saltis kaj ĵetegis sin al la muro. El lia frunto ekverŝiĝis fajreroj.

- Hura, mi pripensis! - ekĝojis Glano. – Frapu refoje pli forte kaj mi provos blovi iun el la fajreroj kaj fari flamon. Per blovado ni trabruligos truon en la arbaĵo.

Avelarba Nukso ree preparkuris, frapis la muron per sia frunto kaj surgenuiĝinte ekblovis la fajreron, alkroĉiĝintan al ia putraĵpeco.

- Glano, kie estas vi? – en la enirejo en la arbotruon aperis la hirtiĝinta hartufo de Pizeto. – Mi venis por savi vin.

Kia estis ĝojo, kiam Araneo malsupreniĝis en la truon kaj eliris ĉiujn kvar malliberulojn de Sciuro. Nur Nukso ne permesis sin esti portata.

- Min, kvarfojan ĉampionon, la aranea ŝnuro ne eltenos. Miaj solaj muskoloj kiom pezas!

- Eltenos. Ĝi eltenis nin tri, kaj vi estas nur unu! - kriis al li el la subo kunamikoj de la malfeliĉulo.

Nukso neniel volis koncedi. Li tiom kverelis, ke eĉ la arbaro silentiĝis, aŭskultante lian kriegon. Kelkfoje li ĵetegis surteren sian ĉapelon, bategis sian bruston per pugnoj, vokis Sciuron por atesti, glutis muskojn ĝis kiam Araneo neelteninte volvis siajn ŝnurojn kaj foriris por triki retojn.

- Nun mi ankaŭ povas veti, ke vi rompos vian kolon, - mokis la durfruntulon Glano.

- Ne rompos mi!

- Vi falflatiĝos!

- Mi tute ne flatiĝos!

Nukso piedpuŝis, fajfetis kaj bumfalas en muskon, eĉ liaj gamboj enteriĝis. La plej granda kverelisto kaj durfruntulo de la arbaro ekhavis du ripojn fleksitajn, sur

la frunto aperis grandega tubero kaj la piedoj, eltirante ilin el la grundo, turniĝis malantaŭen. Nune Nukso rigardis unudirekte kaj paŝadis kontraŭe.

La amikoj kompatis malfeliĉulon, konstruis portilon kaj ekportis lin. Ĉe malgranda flaketo Glano lavis lin, viŝis lian kapon per inko, bandaĝis la rompiĝintajn ripojn per aranea reto kaj diris:

- Kuŝu, ĝis kiam ni trovos la vojon.

Apenaŭ ili iom malproksimiĝis, Nukso saltis surpiede kaj ekkverelis kun si mem.

- Mi vetas, ke mia flanko estas sana.

Sed li nesingarde kliniĝis kaj falis pro doloro en la kuŝejon, preparitan de liaj amikoj. Lia tuta korpo tiel doloris, ke li nekutime laŭte ekkriegis:

- Glano, mi povas veti kontraŭ ĉio, ke mi tuj tuj mortos!

Alrapidiĝintaj amikoj trankviligis la malgajan kontraŭdirulon, tamen li ne permesis esti trankviligata.

- Mi mortos! Finite!

- Nu, mortu, - ekkoleris Pizeto. – Kia problemo? Mankos unu spitemulo.

- Ne, tiuokaze mi spite ne mortos, - restariĝis Nukso.

Tiel la tutan vojon la amikoj suferis ĝis kiam ili evitis la tedigan kunvojaĝanton. Iomete irinte, Nukso ree ekkverelis:

- Ni iras malantaŭen!

- Via kapo ne laboras! – miris Pizeto.

- Ni vetu.

- Ne, ni iras korekte, - respondjetis Glano.

- Ne, nekorekte, mi ĵuras per mia kapo. Ĉu vi ne kredas? Tiuokaze mi iros malantaŭen kaj konvinkiĝos, ĉu vi pravas aŭ ne, - obstinis la kontraŭdirulo.

Kaj kvankam Avelarba Nukso rigardis malantaŭen, pro siaj elturnitaj piedoj li kuris antaŭen. Post ioma tempo la amikoj trovis lin diskutantan kun ia skarabo. Pruvadante, ke skarabo ne estas skarabo, Nukso stamfadis, glutadis grundon, kaj ĵuradis, ke li trapikiĝos tra la tero.

Tamen el malantaŭ la arbo elsaltis Sciuro, kaptis la kontraŭulon je la kolumo kaj portis al la arbotruo.

- Mi vetas, ke mi mortbatos lin per tria frapo, - ankoraŭ sukcesis krieti Nukso.

- Tio estas lia lasta vetado, - ekspiris Pizo.

Glano ankaŭ deziris ion diri, sed li maleviĝis sian kapon surbrusten kaj silentis dum tuta vojaĝado. Nur eskapinte el la terura arbaro, li ekspiris pli malpeze kaj per dankemaj okuloj rigardis al sia amiko.

- Pizeto, kara amiko, ja ankaŭ mi... ja ankaŭ por mi... Aĥ, ne eblas elparoli! – Glano eksentis kiel lian bruston surverŝis ia nova, tre bona sento, kiu bezonis nek vortojn, nek laŭdojn. Li nur mansvingis kaj eĉ pli

>>11

## Ŝercoj



### MOTIVIGO

Jozefino rimarkas ke Kruko portas sportovestojn.

Jozefino: Kio estas tio?

Kruko: Mi decidis kuradi ĉi-jare.

Jozefino: Ĉu vi sukcesos daŭri je tio?

Kruko: Jes, ĉar mi havas firman motivigon.

Jozefino: Motivigon?

Kruko iras eksteren kaj ekkuras: Jes ja. Mi kuros ĝis la vendejo por aĉeti kuketojn!

\*\*\*

### TRAFI KURACADO

Baniko demandas al Kruko: Ĉu vi preferus riĉegiĝi, aŭ trovi kuracilon kontraŭ la kancero?

Kruko ofendiĝas: Kia stultega demando! Kiel vi aŭdacas eĉ demandi tion!?

Baniko, time: Ho, pardo....

Kruko: Ĉu vi komprenas kiom da mono mi povus gajni se mi trovus kuracilon kontraŭ la kancero!?

\*\*\*

### TUTAN LITRON!

Eta Joĉjo eniras la kuirejon: Panjo, mi bedaŭras, sed mi ĵus misverŝis tutan litron da lakto sur la komputilon.

Jozefino: !!

Joĉjo: Kaj mi timas ke la komputilo ne plu tiom bone funkcias.

Jozefino: !!!!

Joĉjo: Cetere, mankas al ni lakto....

\*\*\*

tradukis **Rikardo Cash** el Francio  
publikigita kun lia permeso

Fonto: [esperanto-anekdotoj@googlegroups.com](mailto:esperanto-anekdotoj@googlegroups.com)



## Krucvortenigmo



### KRIPTA FRAZO

Rekonstruu proverbon de Zamenhof (3, 7, 2, 5, 8) interligante apudajn literojn ekde A al A horizontale, vertikale aŭ diagonale.

Fonto: Semajno de Enigmoj #8

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

A	Ĝ	O	M	A
E	N	A	J	L
E	P	O	N	U
S	O	R	T	U
T	A	S	N	A

### EKZEMPLO

Patro nia, kiu estas ...

A	P	A	S
T	T	A	K
R	I	S	I
O	N	E	U

**20>>** **tombo:** fosaĵo en la tero, kien oni metas mortinton; memoriga ŝtono starigita super tia fosaĵo.

**volumo:** unu libro el pluraj, kiuj kune konsistigas pli longan verkon.

Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/mirinda-lego-sperto-kun-proust-r264/>

**T**iu ĉi, ununura en mia vivo, la vojaĝo al Universala Kongreso de Esperanto plene ŝanĝis mian karakteron kaj vivon. Ĉiuj bone scias, kia mi estis malĝentilulo, parolanta Praesperanton, en vilaĝa dialekto, foj-foje eĉ senmezure kaj en malkonvena loko. Estis mi malklerulo, pigrulo, mallertulo, tamen mi volis scii ĉion, scii veron. Kaj mi ne sciis, kio okazas al mi. Mi ofte nervoziĝis, ĉar mi estis malbelaspekta kaj ne parolis la anglan.

En mia junaĝo mi estis malfortsana. Infanaĝe mi faladis de sur la lito, en junaĝo mi faladis de sur la tegmento kaj el la arboj. Tial pro mia malsanemo, miaj gepatroj sendis min al esperantistoj por ĉerpi tie necesajn sciojn. Mi volis iĝi esperantisto kaj ĝis mia tridekjaraĝo mi ne estis tuŝinta virinan korpon, ne gustumis la brandon kaj ne provis fumi tabakon.

Kun mia estonta edzino Svetlana mi konatiĝis nome en Universala Kongreso. Mi dum tuta kongresa tempo observis ŝin de ĉiuj flankoj. Ŝia brusto belege elstaris, ŝiaj kruroj kaj femuroj estis modelaj. Ŝiaj bluaj okuloj fulmis kaj voĉo ŝia estis dolĉa kiel mielo. Krome ŝi parolis modelan Esperanton. Kaj ŝi sentis, ke mi per okuloj senvestigas ŝin. Ne eltenante trae pikantan mian rigardon ŝi abrupte eldiris:

– Hej, vi gapokululo, pro kio vi persekutas min?

Mi ridetante respondis:

– Sed pro kio – ne? Vi ja estas ege ĉarma, belega fraŭlino. Vi tre plaĉas al mi. Ni kunmetu niajn esperantaĵojn kaj restu kune.

Svetlana ne longe pensis kaj tuj respondis:

– Volonte! Ni restu kune.

– Tamen vi sciu, ke mi en mia infanaĝo ofte faladis kapalteren, pro tio mi estas ne nur prudenta, sed ankaŭ sagaca – sin laŭdis mi. Fraŭlino Svetlana el Ruslando ekĝojis kaj ni ĝis la fino de la kongreso restis kune.

Post la UKE mi kun Svetlana venis Litovion, en mian hejmon. Tie ĉi ni okazigis geedziĝan feston, kiun ĉeestis multaj konataj kaj nekonataj gesamideanoj.

Matene post la festeno, vekiginte Svetlana diris al mi:

– Negravas, kiel vi reagos, tamen mi devos naski.

– Nu jes, mi komprenis tion ankoraŭ nokte – diris mi – kiam... ni interkisis.

– Do, se vi estas tiom konscikapabla, sciu vi, ke nia bebo verŝajne estos negrido, nigra kiel karbo – surprizis min Svetlana.

– Do, pro kio vi diris nenion al mi anticipe? – emociiĝis mi.

Svetlana trankvile mallevis okulojn kaj rediris:

– Sed vi demandis pri nenio...

– Nu, kaj kiel tio ĉi okazis? – ekinteresiĝis mi.

– Kiel,kiel... – ekbalbutis Svetlana – vi mem komprenu... Vi ja diris, ke vi estas prudenta kaj sagaca...

Mi abrupte ekcerbumis profunde kaj enhave.

– Atendu karulino, tuj mi solvos tiun problemon... Sekve, se vi korespondas kun samideano el Afriko, do nia bebo estos negrido, ĉu?

Post tiuj miaj vortoj Svetlana eĉ ekveis:

– Nu, vi – Lajmundo, donas vaporon... – vi konsternis min.

Sed mi fiere respondis:

– Lernu de mi, sed ankaŭ vi, karulino, devas cerbumi.

Tiam Svetlana denove surprizis min.

– Mi ne volas, karulo, anticipe timigi vin, sed nia bebo povas esti ĉinsimila...

Tamen min oni ne subigos per nudaj manoj, mi denove montris mian prudenton:

– Nu, en mia parencaro la avino Agota estis mallarĝokula, kiam ŝin la abeloj pikis... nu, kaj onklo Petro... kiam li sur marbordo trobruniĝis.

Svetlana eklevis ŝultrojn kaj daŭris plu:

– Nia bebo povas esti eĉ helbrunhara...

Mi saltis de sur la lito, kvazaŭ pikis min abelo sur mian postaĵon...

– Kion !?... Nee !... helbrunhara, aknoriĉa bebaĉo ne estu, mi tion ne permesos!

Post ses monatoj Svetlana naskis tri bebojn: unu mallarĝokulan, alian nigran kiel karbo negridon, kaj trian helbrunharan lentughavan. Renkontinte amatan edzinon Svetlana, mi ekĝojis:

– Sed vi estas tiel same urĝa kiel mi, ĉar ankaŭ mi estas frunaskita...

Ŝi atente rigardis mian fizionomion.

– Jes...jes, – tian sagaculon mi ankoraŭ neniam renkontis en mia vivo...

Ni vivas bonege, kiel decas en la kondiĉoj de sovaĝa kapitalismo kaj pandemio. Nin ofte intervjuadas televizio, radiofonio kaj gazetaraj ĵurnalistoj. Ni iĝis sufiĉe famaj. Svetlana vespere foriras por promeni surstrate kaj revenas ofte kun la fasko da mono enmane. Nia beba triopo estas sana kaj kreskas bone kaj mi zorgas pri ili. Vi nur ne envidu nin.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio



Mirinda lego-sperto kun Proust



**M**i estis ankoraŭ juna, kiam mi travivis belan, neforgeseblan mensan aventuron. Loĝante en negranda urbo, kie ne troviĝis multe da amuzaĵoj, iun tagon mi ricevis inviton de pli aĝa konato: partopreni en grupeto da geamikoj, kiuj ĉiudimanĉe, de la 9-a ĝis la 12-a horo, kunsidis ĉirkaŭ tablo kun kafo kaj biskvitoj, por legi la ĉefan verkon de Marcel Proust.

Dum kelkaj jaroj seninterrompe daŭris nia legado, ĝis ni finlegis la sep volumojn de *Serĉe de perdita tempo* – unu el la ĉefverkoj de la universala literaturo. Nia metodo estis simpla. La libro rondiris de mano al mano, kaj ĉiu grupano voĉlegis po unu paĝo. De tempo al tempo ni interrompis la legadon por serĉi precizan signifon de iu vorto en vortaro, aŭ por komenti iun aparte atentovekan sceneton. Estis rimarkinde, kiel respektoplene ĉiuj atentis la evoluon de la romanego.

Mi devas konfesi, ke komence ĉiuj grupanoj malfacile sekvis la fluadon de la teksto. La longegaj frazoj, plenaj je subtilaj aludoj, ĉiam elegantaj kaj tamen multeflankaj, ofte devigis nin reveni al la komenco kaj klopodi ne perdiĝi meze de tiom da sinsekvaj ideofluoj. Kelkaj frazoj okupis preskaŭ duonon de paĝo!

Tamen, iom post iom la legantoj alkutimiĝis je la stilo de Proust, kiun ni komparis kun Amazona rivero: trankvila, forta kvanto da vortoj, fluantaj malrapide, en vastega amaso da sentoj, priskriboj, scenoj. Iom post iom ni komprenis la intencon de la verkisto, kiu klopodis montri la socion kaj la homojn laŭ la plej profunda maniero. Ne nur la francan homon, en difinita momento de la franca historio. Proust montris la homojn, kie ajn ili vivas, en kiu ajn historia momento. Mi bone memoras: kiam ni finis la lastan volumon (*La reeltrovita tempo*), ni festis per blanka, malvarmeta vino. Kaj ni dankis la verkinton, kiu proksimigis nin geamikojn unu al la aliaj, dum tiu tre speciala legado.

Ĉion ĉi mi nun rememoras, post kelkaj jardekoj, ĉar ĉi-jare la mondo memoras la 150-jariĝon de la naskiĝo de la granda Marcel Proust. Se mi povus, mi vizitus lian tombon en Parizo, kaj metus apud ĝin

bukedon da floroj. Nek tro grandan, nek tro parfuman bukedon, tiel ke ĝi ne ĝenu liajn pulmojn, kiuj ĉiam suferigis lin pro bronkito. Fakte, la granda verkisto mortis en sia 51-a jaro, pro pulma malsano.

Nu, kion mi diras? Li ne mortis! Li vivas por ĉiu amanto de literaturo, en sia brila verko *Serĉe de perdita tempo*. Nemaŭtrafebla aventuro. En interreto, oni trovas Esperantan tradukon de Ĵeromo Vaŝe almenaŭ de la du unuaj volumoj: Sur la vojo de Svan kaj En ombro de florantaj junulinoj Estas vere bedaŭrinde, ke ni ne havas ĉiujn sep volumojn en nia lingvo. Jen mia subtila propono al niaj franclingvaj tradukistoj.

**Paŭlo S. Viana**

**Pri la verkinto:**

**Paŭlo S. Viana** estas veterana brazila esperantisto, emerita kuracisto, eksestrarano de Brazila Esperantista Junulara Organizo kaj de Brazila Esperanto-Ligo, individua membro de UEA de kelkaj jardekoj. De pluraj jaroj regula kontribuanto al la Esperanta Retradio. Amanto de literaturo, kelkfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA.

**Novaj vortoj:**

**adapti:** ŝanĝi ion por ke ĝi pli bone taŭgu por iu speciala celo aŭ kondiĉo.

**aludo:** temo preparolata sen klaraj vortoj, kiuj iel komprenigas pri kio temas; nereкта sciigo.

**aventuro:** neordinara, neatendita sperto, ofte (sed ne nepre) okazanta dum vojaĝo.

**biskvito:** seka, maldika kuketo, kuirita ĝis ĝi estas malmola.

**bronkito:** malsano, kiu kaŭzas malbonan farton interne de la brusto.

**bukedo:** aro da floroj ligitaj kune.

**ombro:** loko, kie mankas la lumo, kaj tial estas malhela.

**parfuma:** bel-odora.

**pulmo:** en la brusto bestoj kaj homoj havas du pulmojn, necesajn por spirado.

**sceno:** seninterrompa peco de teatraĵo, filmo aŭ romano, pri unu situacio, kaj okazanta kutime en unu loko.

**sin-sekvaj:** sekvantaj unu post alia.

**stilo:** la aparta maniero, laŭ kiu verkisto kunmetas siajn frazojn kaj esprimas siajn ideojn.

**subtila:** delikata, malfacile rimarkebla.

Mi konas, miaj versoj estas de neniŭ bezonataj,  
Sed malgraŭ tio paperon mi difektas.  
Neniŭ vidas ilin, do ne estas ili mallaŭdataj,  
Kaj taŭgas ili, kvazaŭ kvina gambo al hundeto.

Mi spiras pli facile post la vers' skribita,  
La strofo pretas, he - eĉ vivo pliboniĝas,  
Kvankam mi sentas oftajn akrajn renkolikojn \*  
Kaj ĉiam pli kaj pli la korpa pez' grandiĝas.

Fojfoje mi ekvidas kiel alte, alte flugas  
Mizeriĝinta, sed malgraŭ ĉio, bird' de poezio...  
La kapo plenas per nesaĝaj pensoj kaj mi ekdubas,  
Ĉu la kuler' plej gravas en ordinara vivo mia...



\* *renkoliko* : renoj forigas restaĵojn el la sango kaj produktas urinon. Kaj "koliko" estas medicina termino por "paroksismo de doloro".

verkis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius**  
el Litovio

## Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj (parto 3)

(daŭrigata)

Vaste konata libro de 1933 estas la libro "The Shape of Things to Come" de H. G. Wells <sup>20</sup>.

Temas pri scienc-fikcia verko pri la historio ĝis la jaro 2016. En tiu verko *Basic English* estas la interlingvo de la estonta mondo, mondo en kiu post longaj bataloj tutmonda aŭtoritata registaro sukcesas unuigi la homaron kaj devigi ĉiujn lerni tiun lingvon kiel duan lingvon <sup>21</sup>.

George Orwell estis unu el la subtenantoj de *Basic English* ĝis 1945, kiam li iĝis kritika pri ĉiuj internaciaj lingvoj. Cetere *Basic English* inspiris lin pri la *Newspeak*, la lingvo uzata de la registaro en lia libro 1984 <sup>22</sup>. Efektive *Basic English* antaŭvidas simpligojn en la lingvo, kiuj iĝas ekstremaj kaj uzataj kiel politikaj iloj en la romano de Orwell.

La tuta koncepto de simpligita angla lingvo ricevis sian pli grandan reklamon ĝuste post la venko de la aliancaj potencoj en la dua mondmilito, kiel ilo de monda paco. *Basic English* estis uzata en pluraj projektoj. I. A. Richards eĉ promociis ĝian studon en ĉinaj lernejoj. Ĝi influis en posta fazo la kreadon de aparta versio de la angla por disvastigi la novaĵojn de la usona propaganda radio *Voice of America*, ktp. Tio, kio ankoraŭ hodiaŭ estas uzata estas la baza vortolisto de 850 vortoj kiel komenca vortaro de lernantoj tra la tuta mondo.

Sed tio, kio plej impresas, estas ke la projekto *Basic English* estis aparte atentata, eĉ dum la dua mondmilito, de la brita registaro, kiu evidente vidis en ĝi ilon por disvastigi la anglajn lingvon kaj kulturon.

En 1943 Winston Churchill faris faman paroladon en la universitato de Harvard okaze de la ricevo de honora titolo.

Tiu parolado estas ofte citata pro la peceto (nia traduko kaj nia aldonita emfazo): "Ni antaŭeniru kiel pri aliaj demandoj kaj pri aliaj decidoj similaj laŭ celo kaj efiko – ni antaŭeniru sen malbono al iu ajn kaj kun bona volo al ĉiuj. Tiaj planoj ofertas tre pli bonajn kompensojn ol forpreni provincojn aŭ landojn de aliaj popoloj aŭ ekspluate subtrete ilin. **La imperioj de la estonta tempo estos la imperioj de la menso.**" <sup>23</sup>

Sed la parolado mem enhavas multajn aliajn interesajn vidpunktojn, kiujn ni citas ĉi-sekve kaj nur poste komentas. La traduko estas nia kaj ankaŭ la emfazado.

"... Tra ĉi tiu tuta malfacila vojo kaj lukto tipa de nia epoko vi trovos en la Brita Komunumo <sup>24</sup> kaj Imperio bonajn kamaradojn, al kiuj vi estas unuiĝintaj per aliaj ligoj krom per tiuj de ŝtata politiko kaj publika bezono. Ĝenerale ili estas la ligoj de sango kaj historio.

Leĝo, lingvo, literaturo – ĉi tiuj estas konsiderindaj faktoroj.

....

Oni diras, ke la granda Bismarck – ĉar ekzistis iam grandaj homoj en Germanujo – observis ĉe la fino de sia vivo, ke la plej potenca faktoro en la homa socio fine de la dek-naŭa jarcento estis la fakto, ke britoj kaj usonanoj parolas la saman lingvon.

La donaco de komuna lingvo estas tre valora heredaĵo, kaj ĝi povus iam iĝi la bazo de komuna civitaneco. Mi ŝatas pensi pri britoj kaj usonanoj travagantaj libere tra la posedaĵoj de unu aŭ de la alia. Sed mi ne vidas kial ni ne devus provi disvastigi nian komunan lingvon eĉ pli vaste tra la mondo kaj, ne serĉante egoisman avantaĝon je la kosto de iu ajn,



mem posedi ĉi tiun altvaloran agrablan ilon kaj nian naskiĝ-rajton je ĝi.

....

**Antaŭ kelkaj monatoj mi konvinkis la Britan Ministraron starigi ministran komitaton por pristudi la Basic English kaj raportu pri ĝi. Jen konkreta plano.** Estas ankaŭ aliaj planoj, sed ĉi tie vi havas tre zorge forĝitan planon por internacia lingvo kapabla pri tre vasta traktado de praktikaj negocoj kaj interŝanĝoj de ideoj. La tuto estas entenata en proksimume 650 substantivoj kaj 200 verboj aŭ aliaj parol-elementoj – vere ne pli ol tio, kion oni povas skribi en unu flanko de unu sola paper-folio.

Kia estis mia plezuro, kiam antaŭ kelkaj vesperoj, tute senatende, mi aŭdis la prezidanton de Usono abrupte paroli pri la meritoj de *Basic English*, kaj ne estas kunhazardo, ke mi alvenas al Harvard kun ĉio ĉi en la menso, por plenumado de longtempa invito ricevi ĉi tiun diplomon, per kiu la prezidanto Conant honoris min? Ĉar Harvard faris pli ol iu ajn alia usona universitato por antaŭenpuŝi la disvastigon de *Basic English*. La unua laboro pri *Basic English* estis verkita de du angloj, Ivor Richards, nun ĉe Harvard, kaj C.K. Ogden, de la universitato de Kembriĝo, Anglujo. Ili laboris kune.

La Komisiono pri Studoj de la Angla Lingvo en Harvard estas merita kaj pro siaj esploroj kaj pro sia praktika laboro, aparte pro la enkonduko de *Basic English* en Sudan Amerikon; kaj ĉi tiu Komisiono, via Komisiono, laboras nun, laŭ tio, kion oni diras al mi, kun mezgradaj lernejoj en Boston pri la uzo de *Basic English* por instruado de la ĉefa lingvo al usonaj infanoj kaj por instruado de ĝi al eksterlandanoj, kiuj prepariĝas por la usona civitaneco.

Gesinjoroj, mi komplimentas vin. Mi ne volas troigi, sed vi estas la ĉefa fluo de tio, kio povus vere iĝi potenca fekundiga kaj sano-dona rivero. Certe estus granda konveno por ni ĉiuj kapabli moviĝi libere tra la mondo – kiel ni povos fari pli libere ol iam antaŭe kiam la scienco de la mondo evoluas – moviĝi libere tra la mondo kaj kapabli trovi ĉie ilon, kvankam primitivan, por dialogo kaj interkompreniĝo. Ĉu tio ne povus esti ankaŭ avantaĝa al multaj rasoj kaj helpilo por konstrui nian novan strukturon por konservi pacon?

Ni antaŭeniru kiel ni faras pri aliaj aferoj kaj decidoj similaj pri celo kaj efiko – ni antaŭeniru sen malbonaj intencoj al iu ajn kaj kun bona volo al ĉiuj. Tiaj planoj ofertas pli bonajn gajnojn ol forprenado de provincoj aŭ landoj de aliaj aŭ ekspluate subtretadi ilin. La imperioj de la estonta tempo estos imperioj de la menso.”<sup>25</sup>

Kiel ni vidas, la unuaj cititaj frazoj fortigas la koncepton pri komuneco inter homoj kjon la sama

lingvo, la angla. Kelkaj aludoj al sameco de sango, alivorte de komuna raso, eble estas komprenindaj nur en la kunteksto de tiuj solenaj deklaroj.

Sed estas rimarkinda la parto pri la intereso de la brita registaro je la projekto *Basic English* eĉ dum la milito mem cele al disvastigo de la angla. Tion Churchill tute klare konfirmas en la lasta parto de la cititaj frazoj de lia parolado. Tiu plano sonoras, laŭ mi, kiel la mortosonorilo por la Esperanto-movado, sen bezono pri persekutado de esperantistoj sed per simpla superforto per plano, kiu celas la malon kaj kiu estas apogata de la registara potenco de Britujo kaj Usono. Mi kutimas je la diro “ni ne estas malamikoj de la angla”. Bone. Sed la angla en la realo estas malamiko de Esperanto, se ĝi celas transpreni la rolon de Esperanto kiel monda interlingvo. Tion klare diris Churchill en tiu parolado.

En 1934 funkciuloj de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Britujo<sup>26</sup> kreis la “*British Committee for Relations with Other Countries*”. La nomo estis poste mallongigita en 1936 al British Council.<sup>27</sup>

Ĝi ne ludis grandan rolon pro la alveninta milito, sed en 1938 ĝi malfermis la unuan oficejon en Kairo, Egiptujo kaj en 1940 la reĝo Georgo la 6-a donis al la Brita Konsilantaro reĝan statuton por la “antaŭenigado de “pli larĝa kono de la Unuigita Regno kaj de la angla lingvo eksterlande kaj por la evoluo de pli mallarĝaj kulturaj rilatoj inter la UR kaj aliaj landoj.”<sup>28</sup>

Sed ĝia rolo estis granda en la posta historia periodo.

(daŭrigota)

artikolo de **Renato Corsetti** el Britio

Fonto: [https://www.academia.edu/37359946/Corsetti20180627\\_fina?email\\_work\\_card=view-paper](https://www.academia.edu/37359946/Corsetti20180627_fina?email_work_card=view-paper)

<sup>20</sup> Wells, Herbert Georges (1933), *The Shape of Things to Come*, London: Hutchinson & Co. (Publishers) Ltd.

<sup>21</sup> “One of the unanticipated achievements of the twenty-first century was the rapid diffusion of the Basic English as the lingua franca of the world and the even more rapid modification, expansion and spread of English in its wake.” Wells, H. G., citita verko, dua eldono de 1935, paĝo 322.

<sup>22</sup> Orwell, George (1949), *Nineteen Eighty-Four*, London: Secker & Warburg.

<sup>23</sup> *Let us go forward as with other matters and other measures similar in aim and effect - let us go forward in malice to none and good will to all. Such plans offer far*

better prizes than taking away other people's provinces or lands or grinding them down in exploitation. **The empires of the future are the empires of the mind.**

*La tuta parolado, kiu estas komplete leginda por kapti la intencojn de la tiama brita registaro, estas trovebla en interreto: <https://winstonchurchill.org/resources/speeches/1941-1945-war-leader/the-price-of-greatness-is-responsibility/>*

<sup>24</sup> *British Commonwealth.*

<sup>25</sup> *"...Throughout all this ordeal and struggle which is characteristic of our age, you will find in the British Commonwealth and Empire good comrades to whom you are united by other ties besides those of State policy and public need. To a large extent, they are the ties of blood and history.*

*Law, language, literature - these are considerable factors. ....*

*The great Bismarck - for there were once great men in Germany - is said to have observed towards the close of his life that the most potent factor in human society at the end of the nineteenth century was the fact that the British and American peoples spoke the same language.*

*This gift of a common tongue is a priceless inheritance, and it may well some day become the foundation of a common citizenship. I like to think of British and Americans moving about freely over each other's wide estates with hardly a sense of being foreigners to one another. But I do not see why we should not try to spread our common language even more widely throughout the globe and, without seeking selfish advantage over any, possess ourselves of this invaluable amenity and birthright. ....*

*Some months ago I persuaded the British Cabinet to set up a committee of Ministers to study and report upon Basic English. Here you have a plan. There are others, but here you have a very carefully wrought plan for an international language capable of a very wide transaction of practical business and interchange of ideas. The whole of it is comprised in about 650 nouns and 200 verbs or other parts of speech - no more indeed than can be written on one side of a single sheet of paper.*

*What was my delight when, the other evening, quite*

*unexpectedly, I heard the President of the United States suddenly speak of the merits of Basic English, and is it not a coincidence that, with all this in mind, I should arrive at Harvard, in fulfilment of the long-dated invitations to receive this degree, with which president Conant has honoured me? For Harvard has done more than any other American university to promote the extension of Basic English. The first work on Basic English was written by two Englishmen, Ivor Richards, now of Harvard, and C.K. Ogden, of Cambridge University, England, working in association.*

*The Harvard Commission on English Language Studies is distinguished both for its research and its practical work, particularly in introducing the use of Basic English in Latin America; and this Commission, your Commission, is now, I am told, working with secondary schools in Boston on the use of Basic English in teaching the main language to American children and in teaching it to foreigners preparing for citizenship.*

*Gentlemen, I make you my compliments. I do not wish to exaggerate, but you are the head-stream of what might well be a mighty fertilising and health-giving river. It would certainly be a grand convenience for us all to be able to move freely about the world - as we shall be able to do more freely than ever before as the science of the world develops - be able to move freely about the world, and be able to find everywhere a medium, albeit primitive, of intercourse and understanding. Might it not also be an advantage to many races, and an aid to the building-up of our new structure for preserving peace?*

*Let us go forward as with other matters and other measures similar in aim and effect - let us go forward in malice to none and good will to all. Such plans offer far better prizes than taking away other people's provinces or lands or grinding them down in exploitation. The empires of the future are the empires of the mind."*

<sup>26</sup> *British Foreign Office.*

<sup>27</sup> *Brita Konsilantaro.*

<sup>28</sup> *El la oficiala paĝaro de la Brita Konsilantaro, sekcio pri historio: <https://www.britishcouncil.org/organisation/history>*

24>> Vialandaj naciaj esperantistaj informkanaloj.

Informa bulteno pri BET-56, elŝutebla aliĝilo kaj emblemo de la aranĝo estas ankaŭ alkroĉitaj.

La aranĝo estos vere multnombra, interesa kaj utila. Partoprenu mem kaj invitu la aliajn.

Esperante, ke Vi kaj multaj aliaj esperantistoj partoprenos

Amike,

Povilas JEGOROVAS

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Prezidanto de Organiza komitato de BET-56

Tel. mobil. +370 687 12219

[pjedorovas@yahoo.com](mailto:pjedorovas@yahoo.com)

Geamikoj,  
Antaŭ ĉio akceptu mian saluton el la fora lando Ĉinio.  
Unue, nun mi koncize prezentu min: mi, viro, e-nomo  
Gajo, ĉinlingva nomo Li Chuanhua (ideografie: 李传  
华), amas Esperanton kaj ŝatas foje verki kaj traduki  
iom da poemoj k.a.. Nun mi tre ĝojas konatiĝi kun vi  
kaj via revueto.

Ĉion bonan!

Tutamike

**Gajo** el Ĉinio

2021-10-04

Jen mia prova traduko:

(唐) 李白  
床前月光，  
疑是地上霜。  
举头望明月，  
低头思故乡。

Verkis: Li Bai (Tang-dinastio en la antikva  
Ĉinio)

Tradukis: Gajo el Ĉinio



### Sopir' En Nokto

*Antaŭ mia lito verŝiĝas lunlumo,  
kvazaŭ ĉie blankas ter-kovranta prujno.  
Kapklinante mi kortristas pri hejmeo.  
Kaplevante mi rigaras al la luno.*

Klarigo: Li Bai estis plej granda poeto de Tang-  
dinastio en Ĉinio antaŭ pli ol jarmilo. Li ofte migradis  
aliloke for de sia hejmloko. En iu nokto plenluna kaj  
kvieta li kuŝis en la lito sen dormi kaj sentis sin tre  
sola. Dum li spektantis la lunon pretervole sopiro kaj  
hejmeo lin kaptis kaj ronĝadis lian koron. Do aperis  
la supra poemo.

## BET-56

Estimataj kaj karaj .

Post dujara deviga  
pandemia paŭzo la 56-aj  
tradiciaj Baltiaj Esperanto-  
Tagoj denove reale kaj fizike  
okazos en Litovio la 9-17-an  
de Julio, 2022, ĉi-foje en  
Litovia havenurbo Klaipėda apud Balta maro, en la  
universitato de Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio  
invitas Vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. La  
aranĝo estas dediĉata la la 770-jariĝo de Klaipėda kaj  
al la 135-jariĝo de Esperanto.

BET-56 havas aŭspicion de la Universala  
Esperanto-Asocio.

Alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de  
Klaipėda Vytautas GRUBLIAUSKAS.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa  
bulteno pri BET-56 ĉi-tie: [https://sezonoj.ru/2021/08/  
bet-99/](https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/)

Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie: [https://  
mallonge.net/gl](https://mallonge.net/gl)

BET-56 havas ĉiuf flankan subtenon kaj helpon de  
urbaj instancoj de Klaipėda kaj ankaŭ de la tutlandaj  
ŝtataj instancoj de Litovio.

Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn  
kondiĉojn por laboro kaj ripozo.

BET-56 estos vere altnivela internacia  
esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La  
programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj

interesa.

Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉiuj  
sanprotektaj aferoj por eviti pandemiajn danĝerojn.

Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-  
40 landoj.

Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por  
kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn.

Konstante aktualigataj ĉiuspecaj informoj pri BET-  
56 estas en ties retejo: [http://www.esperanto.lt/board/  
zboard.php?id=BET56](http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56)

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la  
novaĵretejo La Ondo de Esperanto, kie estas  
akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo: [https://  
sezonoj.ru/bet/](https://sezonoj.ru/bet/)

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ  
la Eventa Servo: <https://eventaservo.org/e/BET-56>

Listo de jamaj aliĝintoj al BET-56 estas ĉi-tie:  
[http://www.esperanto.lt/board/view.php?  
id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select\\_arrange=headnum&desc=asc&no=9](http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=9)

Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas  
spektebla ĉi-tie: [http://www.esperanto.lt/board/  
view.php?  
id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select\\_arrange=headnum&desc=asc&no=5](http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5)

Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu-ĉi grava  
internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn  
pri sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj

interesa.

Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu-ĉi grava  
internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn  
pri sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj

>>23




## LA FERA BIRDO

“La fera birdo” estas la plej nova novelaro de unu el la plej talentaj nuntempaj bulgaraj kaj Esperantaj verkistoj - Julian Modest. Ĉiu lia rakonto estas metaforo, kiu impresas per perfekta lingvo, eleganta stilo kaj filozofia sugesto. Modest spertas vidi kaj bilde priskribi ordinarajn heroojn kaj okazintaĵojn, kiuj igas nin mediti pri la senco de la vivo, pri la homa ekzisto, pri la ĝojoj kaj ĉagrenoj, kiuj akompanas nin.

La libro aĉeteblas ĉe eldonejo “Libera”.

**Lode Van de Velde**  
la eldonisto



## LA MARO impresio

## verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Ili iradis duope. Vojeto malseka. Kruroj dronas.  
Manoj varmaj. Lipoj humidaj. Hararo disĵetita.  
Rideto karesas. Okuloj verdaj. Voĉo en la silento.

Luna rideto. Unuigitaj la korpoj. Batas la koro.  
La papilioj flirtas. La animo festenas. Ardas la korpoj  
Vortoj senvoĉaj. La fino senvoĉa. La vivo mallonga.  
La amo eterna

La maro blua. Ondoj inundas. Sala la akvo.  
Suno malantaŭ nuboj. Subiro alvenas. La bordo  
dezertas.  
La senfino lazuras. Profundas la maro. Ŝipoj navigas.

Mevoj traflugas. Fiŝetoj saltetas. Rido naskiĝasas.  
Nimfoj dancas. Kanto ama. Sablo odoras.  
La lipoj ardas. Senbruas la emocii. Malĝojo forflugas



verkis kaj sendis  
**Ivaniĉka Maĝarova**  
el Razgrad, Bulgario

## ESPERANTO

## verkis kaj sendis Klara Ilutoviĉ el Rusio

La aĝo obstine rifuzas  
Vigligi por iu konker',  
Sed se Esperanton mi uzas,  
Ĉu vivu pri bono esper'?

En forta venkem' kaj rezisto  
Al ajna malhela invad'  
Esperu plu esperantisto  
Esperanton por ĝia helpad'!

La voĉo kulpiga alfluas  
Atake de iu demon',  
Sed se Esperanton mi ĝuas,  
Ĉu, eble, por mia pardon'?

La sombra humor'preme ronĝas,  
Doloras la viv' ĉiam pli,  
Sed se Esperanton mi sonĝas,  
Ĉu ĝi plu amikos kun mi?

La vivo timigas kaj ŝokas  
Per nova kaj nova malben',  
Sed se Esperanton mi vokas,  
Ĉu lasos ĝi min sen subten'?



verkis kaj sendis  
**Klara Ilutoviĉ** el Rusio

## KAFAR (Καφάρ) \*

Vivi en la sama urbo por ĉiam  
kaj suferi la manion de foriroj,  
kaj forlasante la oficejon vespere  
fari okulan prostituadon en kafejoj.

Iam ŝipoj havis sekretan celon,  
sed la mondo fariĝis malplena flugfolio,  
nun vivi en Grekio estas same  
al vojaĝi al Fernando Po.

Kamionoj estas malbonaj kaj malrapidaj,  
ene de kurierŝipoj vi vundiĝas vidante turistojn,  
ŝarĝante rizon dum monatoj en Ranguno  
estas afero, kiu mortigas artistojn.


La polusoj fariĝis al ni tre konataj,  
ni admiris multfoje la polusan lumon  
kaj la glacio estas kovrita jam de jaroj  
per malplenaj skatoloj de hispanaj sardinoj.

Loti ankaŭ loĝis en Tahitio dum monatoj,  
se vi iros iom pli malsupren, al la Markizoj,  
kie iam oni manĝis bananojn kaj sovaĝajn radikojn,  
kosmetikaĵoj de Coty nun oni vendas.

La japanoj, la knabinoj en Ĉilio,  
kaj la nigraj marokaninoj, kiuj vendas mielon,  
ili havas la samajn kruojn kiel ĉiuj virinoj  
kaj donas la kisojn sammaniere.

La memmortigo, nun privilegio de virinoj -  
ni iam faris ankaŭ tiun pripenson.  
Vi mortas pli malrapide pere de drogoj,  
sed lastatempe ankaŭ ĉi tiuj estas falsaj.

*poemo de Nikos Kavvadias (Νίκος Καββαδίας) \*\**



\* *En la libro "Vardia" de Kavvadias, "Kafar" estas la poemo kaj nomo de putra ŝipo, priskribita per la plej malhelaj koloroj, kiel la fono de serio de rakontoj kun malsataj musoj, senkompataj bastardoj kaj melankoliaj prostituitinoj (p. 131-37). "Kaffar", ja el la franca "cafard", estas blato kaj ankaŭ malĝojo, melankolio, stato de plena apatio kaj katatonio, stato de vivmorto. La elekto de la franca termino - skribita per grekaj literoj - estas certe ironia: la ekzotikeco de la vorto difinas ĝuste la kaŭzon de la malĝojo, la mankon de ekzotismo en la vivo de la poeto, kiu havas "la koleron de foriroj", sed estas malliberigita "en la sama urbo por ĉiam."*

\*\* *Nikos Kavvadias (1910-1975) estas greka moderna poeto, verkisto kaj maristo profesie. Li uzis siajn vojaĝojn tra la mondo, sian vivon kaj siajn aventurojn en la maro, kiel potencajn metaforojn pri la eskapo de ordinaraj homoj al ekster la limoj de realeco.*



*tradukis Vasil Kadifeli el Turkio*

27>>

ĉefloko de ferfabrikado, ni bedaŭregis, ja plurmiloj da gelaboruloj senlaboriĝis. Tamen poste ili trovis laboron en aliaj lokoj kaj la akvo de la rivereto Szinva komencis puriĝi. Nun jam multaj arbaraj kaj kampaj bestoj, birdoj iras al la riveretakvo por sensoifigi kaj nutri sin. Oni povas vidi tie multajn grandajn egretardeojn, kaj aliajn ardeojn, malofte ankaŭ purpurardeon, nigrajn kaj blankajn cikoniojn, sovaĝanasojn kaj aliajn akvajn birdojn kiuj trovas ĉiam malgrandajn fiŝojn, ranojn kaj akvajn skarabojn en la ŝaŭmoj de Szinva. Pere de la puriĝo de la akvo de Szinva, komencas restariĝi la ekvilibro, ĉar renoviĝas la naturo. Al la plena bonstato nur unu gravaĵo mankas: tio, ke la loka loĝantaro kaj la ekskursantoj ne disĵetadu rubaĵojn kiel ili nun faras. Akceptu ĉiuj, ke tio endanĝerigas ĉiujn vivantojn. La

rubajoj volviĝas sur la korpoj de bestoj, kaj se aliaj bestoj manĝas tion, tio damaĝas iliajn intestojn kaj kaŭzas morton. Multaj birdoj havas altvaloregan simbolan valoron, kion tamen devas punpagi la damaĝinto. Granda perdo estas ĉiu neniiginta, perdita birdo! Se ni volas plue vivi sur ĉi tiu tero, ni devas defendi nian vivmedion, ja ni respondecas pro ĝia pureco! Ni devas gardi kaj la teron kaj la sure ekzistantajn akvojn, por ke ili estu puraj, sen damaĝaj efikoj en intereso de la tuta vivularo!

Fonto: **Flugas la birdo... - rakontoj**, Adrienne Pásztor  
Publikigita kun la permeso de la aŭtoro

## El tagĵurnalo de kato

(Fragmento)

**N**e estas vere, ke mi ne amas la hejmanojn. Ankaŭ mi kapablas ami, same kiel ĉiu vivulo, sed ne senkritike. Mi amas nur tiun, kiu estas aminda. Miajn sentojn mi ne esprimas laŭte, spektakle. Kiu ne komprenas mian mallaŭtan ronradon, tiu ne meritas la amikecon de inteligentaj, bongustaj bestoj. Kiu ne kapablas longe sidadi samloke, tiu ne meritas



## tradukis kaj sendis Lenke Szász el Hungario

mian societon. Kiu ĉiam bezonas nur bravan spektaklon, por kiu ne sufiĉas la simpla beleco de la naturaj movoj, tiu neniam povos akiri la simpation de kato. Kiu ĉiam postulas novaĵojn, kiu ĉiam peladas la variecon, la eksciton, kiu ne ŝatas la pacon, la ekvilibron, la konstantecon, kiu kredas, ke li ĉiam devas pruvi sian ekzistorajton, ki ne konas la belecon de la meditado, tiu neniam havos fidelan katon. Kiu pelas la supraĵajn plezurojn de la vivo, al tiu la kato turnas la dorson. Kiun la katoj ŝatas, tiu ne povas esti fihomo.



de **György Bálint** (1906 – 1943)

Elhungarigis **Lenke Szász**

## Migrantaj akvaj birdoj en areo de Miŝkolc <sup>1</sup>

## tradukis Adrienne Pásztor el Hungario

**M**i ne kredas, ke ekzistus eĉ unu sola lando sur nia planedo, kie oni ne atentus volonte la birdojn irantaj inter ni homoj, alprenantaj kiel nutraĵojn aŭ nestajojn: semojn, forĵetaĵojn, aŭ la birdojn migrantajn, kiuj flugas super nia kapo surĉiele. Ili estas eroj de la tera vivo, al ni apartenantaj.

Mia urbo Miŝkolc situas ĉe la suda deklivo de la nord-hungara montaro Bükk, sed ĝiaj karstaj kalkŝtonrokoj troveblas ankaŭ sur la teritorio de Grand-Miŝkolc, per sia spektaklo ĝuigantaj kaj okulojn kaj korojn. Sur la maldikaj grundotavoloj kovrantaj la rokojn kreskas diversaj arboj, arbedoj, molaj kaj malmolaj tigaj herboj. Laŭ la akvo plufuanta el la fontoj, el la riveretoj, inter la kreskaĵoj vivantaj sur la akvodensaj lokoj, diversaj akvaj birdoj nestas samtiel, kiel denove aliaj vivas inter la kavoj. Printempe, kiam la rigideco de la vintraj tagoj mildiĝas, eksonas kantado de miloj da birdoj, arbare, kampe. Ĉio reviviĝas, revigliĝas, post la longa vintra dormo denove ekiras la vivo en la ĉeloj de la kreskaĵoj kaj en la birdonestoj. Sur la Bükk – a karsto estas dense akvofluoj de fontetoj, multas la akvaj vivlokoj, kiuj havas proprajn birdajn sociojn, sed ankaŭ el aliaj landoj alvenas birdoj por vintrumi.

Al la Bestĝardeno apartenanta al Miŝkolc, samkiel al la Birdoprotektada Staciejo, ĉiujare oni enportas birdojn trovitajn urborande, aŭ surkampe, kiuj bezonas nutraĵojn por la vivdaŭrigo aŭ pro sia vundiĝo veterinaran helpon per medikamentoj por savi ilian vivon.

Ottó HERMAN 19-jarcenta granda hungara natursciencisto, la distingito per ordeno de la franca Honora Legio, kies muzeosimila somerdomo viziteblas

en proksimeco de la Szinva-riveretbordo en Lillafüred (parto de Miŝkolc), inter aliaj skribis libron ankaŭ pri „La Utilo kaj la malgajno de la birdoj”. Ĝi estas vere priatendinda verko. Kiam mi estis vizitanta en tiu muzeo, min tre interesis ankaŭ lia alia verko, pri la fiŝoj de la hungara lago Balatono nomita hungara-mar, per propraj desegnaĵoj montranta la praan fiŝkaptistan metodon. Tiu estas ĝis nun neforgesebla. Kiam en urbo Split, ĉe la Adriatiko mi estis vizitanta en 1973, mi vidis, ke tie el la kristalpura marakvo la fiŝistoj kaptis kaj kolektis fiŝojn sammaniere, per la praa metodo priskribita de Otto HERMAN. (El la boatoj la fiŝistoj subakvigis grandan relon kaj post paso de ĉ. duona horo, ili revenis kaj ekpelis la fiŝojn en la reton per batego de la marakvo per grandaj dikaj bastonoj.) Tiu spektaklo estis tre grava travivaĵo. Tiam en Kroatujo la fiŝistoj multegajn tre belaspektajn fiŝojn kaptis por tagmanĝo de la hotelologantoj. Niaj Borŝod – departamentaj akvaj birdoj kaptas fiŝojn por nutriĝi en riveretoj, lagoj, marĉoj.

En nia regiono ankaŭ en du kromaj lokoj estas trovebla simila birdodefendanta, birdohelpanta stacio. Ili laboroj bezonatas, ĉar al la miaregionaj akvaj vivlokoj pro la klimata ŝanĝiĝo ofte alvenas birdoj de aliaj nordaj regionoj. Poste ili restas vintrumi apud la rivereto Szinva (sinva) aŭ en la turistloko Lillafüred (lilafured) sur la lago Hámori, aŭ ĉe la lago de Mályi (maji), aŭ sur la varmakva boatlago de Miŝkolc-Tapolca, kie troveblas ankaŭ la same termakva grotta banejo. Kiam mia urbo ĉesis esti plu la nord-hungara



>>26

**E**n la tria jaro de Tianshou-erao (692 p. K.), Zhang Yi de Qinghe funkciis kiel oficisto en Hengzhou kaj tie loĝis. Li estis homo kvietaj, kun malmulte da amikoj. Al li naskiĝis ne filo, sed nur du filinoj, el kiuj la pli aĝa mortis jam infanaĝe kaj la pli juna Qianniang elkreskissenkompare ĉarma kaj bonvirta fraŭlino.

Zhang Yi havis nevon Wang Zhou de Taiyuan, kiu montris sin inteligenta kaj bela jam de infanaĝo. Zhang Yi taksis sian nevon tre kara kaj ofte diris: "Mi certe edzinigos Qianniang al li." Poste, ambaŭ elkreskis gefraŭloj kaj profunde amis en sia koro unu la alian, sed tion la gepatroj sciis neniom. Hazarde iu eminenta el la suboficistoj petis de Yi la manon de Qianniang kaj Yi konsentis ties svatigon. Informiĝinte pri tio la fraŭlino ege ĉagreniĝis, ankaŭ Wang Zhou suferis de malkontenta indigno.

Pretekste ke li devas veturi al la ĉefurbo por la ŝtata ekzameno, li petis de Yi forpermeson. Ne povante deteni la nevon, Zhang Yi forsendis lin kun abundaj donacoj.

Kun kaŝita turmento en la koro, Wang Zhou faris adiaŭon kaj sidiĝis en boato. Vespere, la boato veturis sufiĉe malproksimen kaj atingis bordon ĉe monto. Noktmeze, kiam Wang Zhou neniel povis endormiĝi, li aŭdis subite de la bordo trotajn paŝojn kaj iu rapide alproksimiĝis. Ekrigardante, li trovis ke estas Qianniang alkurata kun nudaj piedoj. Zhou estis ravita de la neatendita feliĉo. Premante la manojn de la knabino li demandis kial ŝi alvenis.

"Mi ne povas vin forgesi eĉ en sonĝo!" diris la fraŭlino lamente. "Nun oni devigos min edziniĝi al alia homo kontraŭ mia volo, sed mi kortuŝiĝis de via neŝanĝebla profunda amo al mi, tial mi decidis reciproki vin kaj alkuris spite ĉion for de miaj gepatroj."

Pro la neatendita feliĉo Wang Zhou ekstazis neordinare. Li kaŝis la knabinon en la boaton kaj rapidigis senprokraste. Zhou tagnokte spronis la boaton kaj post kelkaj monatoj li atingis Sichuan-provincon.

En daŭro de kvin jaroj Qianniang naskis du filojn.

Ŝi ne korespondis kun siaj gepatroj, sed ĉiam sopiris ilin. Foje, plorante ŝi diris al la edzo:

"Mi venis al vi ĉion spitante. Dum kvin jaroj min informis nenio pri miaj gepatroj. Ĉu restas do loko en la mondo por tiel malĝentila fili no kiel mi?"

"Ne ĉagreniĝu, ni vizitu ilin!" respondis la edzo kortuŝite de ŝia turmentiĝo kaj ili kune veturis al Hengzhou.

Atinginte Hengzhou, Wang Zhou vizitis la domon de Zhang Yi la unua kaj rakontis ĉion okazintan.

"Kia babilo!" mirigite diris Zhang Yi. "Dum tiuj jaroj Qianniang ja restadis ĉiam malsana en ŝia buduaro!"

"Tamen nun ŝi troviĝas en la boato!" persistis Wang Zhou.

Kun pliigita surprizo Zhang Yi sendis serviston al la bordo por konstati. En la boato efektive sidas Qianniang, flora kaj vigla, ŝi demandis al la servisto:

"Kiel fartas miaj gepatroj?"

Ege mirigite la servisto rapidis al Zhang Yi kaj raportis kion li vidis propraokule.

Kiam la malsana fraŭlino kuŝanta en la buduaro informiĝis pri tio, ŝi ellitiĝis, sin ornamis kaj ŝanĝis al si vestaĵojn, ridete, tamen tute senvorte. Ŝi eliris renkonte al la alia Qianniang kaj antaŭ ĉies okuloj la du fraŭlinoj kuniĝis en unu korpon kaj duobliĝis iliaj vestoj unu super la alia. Tiun okazintaĵon la familio de Zhang Yi opiniis ne normala kaj sekve tenis ĝin ĉiam sekreta. Pri tio subsciis nur ne malmulte da parencoj. La geedzoj portis post 40 jaroj kaj iliaj du filoj ambaŭ sukcesis en ŝtataj ekzamenoj kaj funkciis kiel asistanto de guberniestro aŭ kapitano pri publika sekureco. Mi, Xuanyou, multfoje aŭdis tiun historion dum mia junaĝo. Kelkaj rakontis ĝin kun nesamaj detaloj, kiuj iuj aŭskultantoj opiniis ĝin elpensita. Dum la lastaj jaroj de Dali-erao (766-779) mi renkontiĝis kun s-ro Zhang Zhongxian, la guberniestro de Laiwu, kiu detale rakontis al mi tiun historion. Ĉar genealogie Zhang Yi estis onklo de la guberniestro, tial li sciis tre bone tiun koriozan okazintaĵon, kiun nun mi verkis en tiu ĉi rakonto.

5>> supre?

- Ĉu la infanoj de Georgo fariĝis bonaj homoj? Aŭ ĉu ili sekvis la paŝojn de Potter?

- Ĉu senklasa mondo, en kiu troviĝas nek Potter, nek Bailey, ne estas mondo kun "feliĉa fino" almenaŭ same al la filmoj de Frank Capra?

- Se la vivo havas dialektikan kontinuecon aŭ ĝi estas Jino Jango, ĉu la lasta koncepto estas nia inventaĵo?

- Ĉu Mary la edzino de Bailey ne estas pli flatema

al viro kontraŭ al asertema kaj militema virino? (Plue Maria ne estas pasiva aŭ obeema virino. Ŝi estas nur mola.)

- Ĉu Usono, kiu ekde la fino de la dua mondmilito ekhavis savan mision kaj konservis tiun ĉi bildon longe en la kunlaborantaj landoj, dormigis nin pere de ĉi tiuj filmoj?

- Se mi ankoraŭ volas ridi kaj plori kun filmo de Frank Capra en la fino de la jaro, malgraŭ koni la politikajn, ekonomiajn kaj sociajn realaĵojn de la >>>

**KIAL NE ALVENAS**

Avino Ana kelke da tagoj manĝas nenion. Pro tio ŝi vizitis kabineton de d-ro Petrov. Oni parolas, ke li estas ne nur spertulo en sia profesio, sed estas tre bona ŝerculo. Ofte li kuracas kun sia rido kaj ŝercoj.

La paciencino de la pordo komencas plendi, ke nenion manĝas, nenio plaĉas al ŝi. D-ro Petrov ĉesigas ŝin kaj diras:

- Sufiĉe, kara, ne maltrankviliĝu. Ĉio pliboniĝos. Prenu tiun ĉi siropon, trinku ĝin antaŭ la manĝaĵo kaj s-ro Apetito nepre vizitos vin.

Antaŭ la adiaŭo avino Ana donacis al la kuracisto trikitan hometon okaze de lia jubileo.

Ŝi revenas hejmen kaj plenumas regule la konsilon de d-ro Petrov. Miraklo! Ŝi komencis nutri sin. Ŝi ne ŝlosas la pordon, ĉar povus aŭdi kiam alvenos s-ro Apetito.

De matene ĝis vespero atendas, sed kial li ne alvenas. Ĉu li ne malsaniĝas? Verŝajne COVID -19 malhelpas al li alveni.

La maljuna virino telefonas al la kuracisto kaj demandas lin, ĉu li scias, pro kio s-ro Apetito ne vizitas ŝin jam unu semajno. Se estas malsana estas necese helpi. Kaj ŝi preĝos por li.

**D-ro Parmakova****PROMESO**

Valja – amata edzino de la fama pentristo Nikola laboris kiel medflegistino, sed, bedaŭrinde, la terura COVID -19 ne preterlasis ŝin.

Antaŭ sia supozebla morto ŝi petas sian amatan edzon:

- Kara mia Koljo, promesu al mi, se mi forpasos, via dua edzino, aŭ litamikino ne portados miajn vestojn, ŝuojn, ŝtrumpojn...

- Ne timu, kara mia kateto, eĉ ne pensu pri tio. Ŝi ne portos nenion de viaj aĵoj, ĉar ŝi estas pli alta, pli maldika, svelta ol vi – respondas la zorgemulo.

Li ĉion tre bone pripensis, ĉu ne? Sed!?!

Post unu monato Valja jam laboris en malsanulejo.

**D-ro Parmakova**

Humuraĵoj de **Radka Stojanova**  
el Bulgario

Dua premio pri humuro

&gt;&gt;&gt;



mondo, ĉu mi ne satiĝis al dormo?

- Se homo estas homo, kia estas la bezono por politikaj partioj, doktrinoj, dogmoj, religioj, regantoj?

- Sed se homo estas homo, ĉu tio estas nur ĝia boneco? Ĉu malboneco ankaŭ ne estas tiom antikva fenomeno ekde la antikvaj fabeloj?

- Ĉu spekti tiun filmon kun ĝia feliĉa fino ne estas agrabla afero kiel varmeta cinema vino de Kristnasko, anstataŭ ol fari tiom da demandoj?


Feliĉan novan jaron al ni la vivo-limigitaj homoj



ĉirkaŭitaj de maro, tero, ĉielo kaj arbaroj! Kvankam ĉiaj problemoj kaj katastrofoj, beleco kaj pozitiveco daŭras seninterrompe. Espero estas kiel vitamino. Ĝi ne manku al nia interno!

**FELIĈAN KRISTNASKON KARAJ MONDAJ ESPERANTISTOJ!...**

verkis kaj sendis **Konural Sunal**  
23-a de novembro 2021  
Buyukada insulo – Istanbulu Turkio



— Saluton! Ĉu vi jam manĝas vian farunaĵon?

— Saluton! Mi jam frue finis la rekrutigon.

— Kaj kiel sukcesis la rekrutigo? Ĉu okazis io interesa? Per kiom da kripluloj vi riĉigis la armeon?

— Tion mi ne faris, sed troviĝis iu fortega, atleta knabo. Kiel iu antikva statuo de sportisto. Mi tuj deklaris, ke la armeo bezonas ĝuste tiajn atletstaturajn knabojn. Kaj jen, tiam li surprize demandis: «Tiu-okaze, kial vi rekrutigas min?»

— Mi ne komprenas: kial vi rekrutigas lin, se li estas forta kaj sana?

— Ĝuste tion li demandis.

— Sed en tio estas kontraŭdiro!

— Nu, feliĉe, vi ankaŭ rimarkis. Nature, ĝi estas kontraŭdiro.

— Kaj vi ne ridis?

— Tiam ankoraŭ ne. Mi nur rimarkigis, ke ĝuste pro tio mi rekrutigas lin. La patrujo bezonas ĝuste tiajn knabojn, kiuj per fortaj manoj ekstermas la malamikon.

— Kaj li?

— Li respondis, ke, ĉar li estas forta kaj sana, kial do oni portas lin al la buĉejo. Li ankoraŭ povus multe labori por la patrujo. Sed ĉio ĉi estas ankoraŭ nenio: li proponis, ke oni portu al la batalkampo la malsanulojn, al kiuj la vivo estas jam nur sufero kaj ŝarĝo, kaj kiuj estas jam ŝarĝoj ankaŭ por aliuloj.

— Sed tiam vi jam ekridis, ĉu ne?

— Mi ne kuraĝis. Apud mi sidis la subkolonelo kaj du kapitanoj, tie staris amaso de senvestaj rekrutoj. Mi ektimis, ke ankaŭ mi implikiĝos, se mi plu aŭskultos lin. Flustre mi diris, ke li gardu sian langon, ĉar li eble estos arestata, kiel la kvakeroj kaj nazarenoj.

— Ĉu li ne havis cerbomalsanon?

— Ankaŭ mi suspektis tion, sed se li ne estas danĝera malsanulo, la cerbomalsano ne estas motivo por liberigi lin de la militservo. Sur la batalkampo estas bezonataj ne la alta matematiko, nek la helena filozofio, sed tute aliaj aferoj. Mi konis kaŝfrenezulon, kiu havis la manion de militestro: li senĉese skizis

militmapojn, sur kiuj li komandis korpusojn. Kaj cetere, li estis unu el niaj plej eminentaj serĝentoj.

— Eble li eĉ ne estis frenezulo! La militestroj faras same.

— Sed serĝento! Kaj, kiel serĝento, li tre taŭgis.

— Nature. Sed same estas certe, ke pacifista frenezulo povas la armeon nur demoralizi.

— Tio jam ne koncernas min. Mi estas kuracisto, ne militjuĝisto. Mi persistas ĉe la kuracista moralo, kiun preskribis al mi la ŝtato. Tiu, kiu korpe taŭgas, taŭgas por militservo kaj fino!

La kelnero alportis la tagmezmanĝon kaj la kuracistoj ekmanĝis.

— Kaj ĉu ne vi spertis ian interesan okazaĵon?

— Mi havis nur unu pacienton, sed mi okupiĝis pri ŝi dum la tuta antaŭtagmezo. Ŝi provis sin mortigi.

— Ĉu per revolvero? Veneno?

— Ŝi estis olda, okdekjaraĝa kancera onjo, kiu venenis sin per morfino.

— Rezulto?

— La rapida stomaklavado savis ŝin.

— Brave!

— Feliĉe oni eksciis jam frue. Ŝi eĉ ne ekdormis tute, kiam ni jam komencis la stomaklavadon. Baldaŭ ŝi rekonsciigis kaj anstataŭ danki ŝi komencis plori kaj plendi, eĉ riproĉi al mi: kial mi ne lasis ŝin morti sen suferoj?

— Por ke oni poste arestu vin, ĉu ne? Tre ĉarme!

— Ankaŭ mi diris al ŝi, sed ŝi diris responde, ke mi plilongigis nur la suferojn al ŝi. Nature, mi komencis ŝin persvadi, ke la vivo estas bela, ŝi povas ankoraŭ resaniĝi; finfine la hodiaŭa scienco jam... kaj tiel plu, kiel kutime.

— Kaj vi ne ridis...

— Vi diris moke, sed la afero estis tre serioza. Mi prefere emis plori. Sed min katenas la kuracista moralo. Ne mi preskribis ĝin. Kaj tiu moralo preskribas, ke la vivon ni devas plejeble plilongigi. Kaj tiu principo tre pravas. Pripensu nur: se ni permesus la sensuferan morton, kiom multaj misfaroj povus okazi! Fortajn, sanajn homojn, kiuj ankoraŭ povus multe labori por la patrujo, oni mortigus, ĉar la malpuraj interesoj de kelkaj friponoj tion dezirus!

(1972)

## MIRAKLA FABELO - nova infanlibro de Julian Modest

**Mirakla fabelo** – infanlibro, originale verkita en Esperanto. Eldonis Libera – 2021.

Julian Modest estas konata aŭtoro de multaj libroj kaj nun antaŭ la Kristnaskaj Festoj kaj la Nova Jaro aperis lia infanlibro “Mirakla fabelo”, en kiu la verkisto rakontas pri multaj mirakloj. En malvarma vintra nokto iu neĝhomo, farita de infanoj, subite ekparolas. Ĝi ne deziras esti sola, sed havi amikojn kaj travivi neordinarajn aventurojn. Ĉio en la libro estas alloge kaj fabele bele.


Eblas mendi la libron ĉe UEA aŭ ĉe eldonejo Libera.



## Poemo dediĉita al 134-a jariĝo de Esperanto uzado

Lazaro Ludoviko  
via E-o gramatiko  
al ĉiu konvenas,  
al ĉiu bonvenas!  
Laŭdata akuzativo  
servas kiel forta lokomotivo  
por ke nia trajno ne stumblu,  
stirante nin de unu al la alia,  
iranta ĉiam antaŭen, nun eĉ plu.  
Diminutivon ni facillernigas.  
Ĉar dometo aŭ domego  
dependas nur de via ego !  
Esperantistoj estas gaja, helpema amikar`  
troviĝinta en montar` aŭ apud mar`.  
Ili ĉiam donos bonetoson  
per kant` bela aŭ ŝerco navigvela.  
Ja, gravas, ke oni ĉiam pravas  
dirante: `Lernu, verku, kaj parolu  
ĉiutage laŭte aŭ lante

gravas nur esperante!  
Esperanto ofertas esperon, amikadon  
Senpagan reton aŭ klasikan  
laŭnivele virtualan  
Esperanto-edukadon!



verkis kaj sendis  
**Miriĉ Jadranka**  
Zajecara Esperanto  
klubo  
2019 Serbio



*Solvo de la krucvortenigmo*

Aĝo maljuna ne estas oportuna

### El multe legata ĉeĥa gazeto „Květy“ (Floroj), gazeto por la tuta familio

#### Ankoraŭ nun estas bone...

Tiu, kiu vidis la filmon „Sep bravuloj“, memoras la drastan anekdoton pri viro, kiu falante de domo, en ĉiu etaĝo aŭdiĝas frazo de titolo. Lastatempe ankaŭ mi uzas ĝin. Ĉar mi loĝas preskaŭ sub „Nusla ponto“ („Nuselský most“ en Prago, tamen tie ne fluas rivero), neniam mi malmemoras observi ĝin, ĉu ne staras tie iu malfeliĉulo... Neniu falas sur min, estas bone... Mi veturas hejmen. Mi eliras el la aŭto kaj atendas amikino. En unudirekta strato kontraŭ mi rapidas kun nekredibla rapideco veturilo kun frenezulo stiranta. Mi flanken saltas kaj diras: „Estas bone...“ Post sekundo denove. Mi vokas telefonnumeron 158 kaj diras, kio okazis, kaj pensas: „Ĉu mi starigu mian aŭtomobilon transverse sur strato por haltigi la danĝeran frenezulon? Ja, en momento devos veni mia amikino kontraŭ li.“ Feliĉe ŝi jam estas ĉi tie kaj la frenezulo malaperis: „Estas bone...“

Matene mi ellitiĝas, ŝaltas la radioaparaton, kaj aŭdas, ke iu frenezulo mortpafis iun ĉe nia angulo. Terura afero, sed: estas bone, ne estis mi kaj neniu el miaj parencoj aŭ konatuloj. Mi eliras kaj venas al la aŭto – la seruro estas iomete difektita, sed funkcias, oni ŝtelis nenion: „Estas bone...“. La sekvan tagon mi aŭdas en la radio, ke oni mortpafis la premieron, mi ektimas, sed: „Estas bone... Li estis de Serbio!“

Ve!!!

Kion plu post mallonga tempo ni akceptos ankoraŭ kiel bone, aŭ preskaŭ bone??? Mi sentas min kiel la viro falanta de domo. Ni falas pli kaj pli rapide, eble tio baldaŭ ne estos bona.

Tamen, male de la viro, ni eble povas ion fari...?

*Květy 12/2003, p. 3.*

*Jiří Vávra „Komenca vorto - Slovo na úvod“*

#### Per sporto al perforto

Kelkfoje dum mi spektas sporton, mi konsideras min kiel civitanon de imperiestro Nerono. La panon nun oni ne donas senpage, tamen la ludoj estas identaj kun la romianaj. Ne gravas, ĉu temas pri futbalo, aŭ alia

kolektiva ludo, plejparte regas agresemo. Eĉ en tiu mezuro, ke vico da ŝtatoj havas pli grandajn problemojn ol tiuj kun terorismo. Post Britio, kie oni havas pli severajn leĝojn kontraŭ „sportamantoj“ ol al rifuĝintoj, en la sama direkto ekiris Francio, Italio kaj vico da aliaj. Ĉe ni, kiel kutime, ni estas iomete ĉe la vosto, kiel ni vidis dum la matĉo de Bohemians. Sed, por ke mi pacigus spektantojn, restas problemo kun la ludantoj mem. Se malfirme teniĝi nervoj de idoloj, „kiel teniĝis la nervoj de „sportŝatantoj“ mem? Do, se ekzemple Koller, Řepka aŭ laste Hašek anstataŭ ludmajstreco vendos emociojn, oni ne povas vidi lumon sur la fino de la tunelo. Cetere, mi ne povas forpreni la impreson, ke se la ĉefa motivo estas mono, la ĝojo de ludo kaj de venko, sento de „fair play“ – de honesta ludo, devas esti deformita. La pruvo, de tiuj ĉi miaj vortoj, ke sporto sen profesiuloj estas brila amuzo, estas por mi la futbala matĉo inter du montvilaĝaj teamoj. Amuziĝas la ludantoj kaj same spektantoj. Tie la plej agresiva konduto estis alvoko de sinjoro Horáček, kiu avertis kontraŭulon, kiu baris per nepermesita maniero, ke en lia vilaĝo ili estas nombraj, kiel miksrasaj hundoj kaj tiel li ne rajtas deŝiri kalsonon de loka ludanto. Spite la malvenko de la lokanoj, ĉiuj foriradis kontente al la patrino, aŭ trinki bieron.


Simple, tiu matĉo estis pli profita, ol ĉiuj profesiaj konkursoj de la mondo. Ĉu mi eraras kaj sporto sen perforto kaj sen paketoj da mono estas malbonvena?

*Květy 22/2003, p. 3.*

*Slovo na úvod (Vorto por komenco), Jiří Vávra.*

**Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotová**



SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI  
  
 RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

#### TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds